


# EL POPOLA ĈINIO 6

中國報道  
1983





En la Nanning-a Zoologia Ĝardeno





Tagika virino kaj ŝia infano

Foto de **CAI HAIFENG**



Infano kaj kokidoj


Foto de **YU ZHIXIN**



Bele ornamita mjaŭ-a infano

Foto de **JIANG ZHENMING**

Knabinoj en la kamparo de Shaanxi-provinco







Mi prova!  
Foto de YU ZHIXIN



Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

### SUR LA KOVRILO:

Danco kun longa tamburo estas unu el la kore-naciaj dancoj. Dum la prezentado la ludanto kaj kantas kaj dancas, frapante tamburon faritan el paŭlovnia ligno, kun streĉitaj ledfolioj ĉe ambaŭ flankoj. La ludanto batas ĝian maldekstran flankon per mano kaj la dekstran per frapilo, estigante belajn sonojn. La foto montras prezentadon de la fama kore-nacia dancistino Cui Meishan.

### SUR LA DORSKOVRILO:

Lago en matenkrepusko (Ĉinstila pentraĵo)

de Xu Xi

### KOLORAJ SERIOJ:

Feliĉaj infanoj  
Pejzaĝoj de Pamiro  
Fotoj faritaj de esp-istoj  
Vojaĝo laŭ la Granda Kanalo (6)  
La templo Sa'gya

### NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La kultura vivo de kamparanoj de Chuxian

La Drakboata Festo — Qu Yuan —

Miluo-rivero

Vicprofesoro Zhu Wenrong

Mia restado en Ĉinio . . . . .	16
Esperanto en la Ĉina Internacia Turisma Konferenco . . . . .	15
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	13
Memore al la 100-a datreveno de la forpaso de Karl Marks . . . . .	7
Fangshan — Restoracio kun gusto de ĉinaj palacaj mangaĵoj . . . . .	11
Vojaĝo laŭ la Granda Kanalo (6): En hejmloko de silko . . . . .	50
La spacaj scienco kaj tekniko de Ĉinio . . . . .	8
Sunenergiaj fornoj en Ĉinio . . . . .	5
Kiel Ĉinio ŝparis energion? . . . . .	2
Kiel esperantistoj povus vojaĝi al Ĉinio? . . . . .	20
La sufikso por acidoj . . . . .	18
SUR NIA LIBROBRETO: Vivo verva kaj vermuta . . . . .	19
POR KOMENCANTOJ: Ter-nukso . . . . .	17
Li Shijun fariĝis membro de la Akademio de Esperanto . . . . .	14
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	22
Privataj lernejoj en Pekino . . . . .	24
Gajninto de 5 oraj medaloj . . . . .	27
Kiam la trajno haltas ĉi tie . . . (Novelo mallongigita) . . . . .	35
Rido junigas . . . . .	47
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Senmedikamentaj terapioj de la ĉina medicino . . . . .	28
En strateto de Pekino . . . . .	45
Edziĝa ceremonio en reedukejo . . . . .	33
MIA VIVO: En alternejo . . . . .	30
VIDINDAJ LOKOJ: Pamiro — firsto de la mondo . . . . .	26
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La mallongtempa unuigo de la Okcidenta Jin-dinastio . . . . .	41
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Sa'gya-templo . . . . .	48
Novaj tendencoj de la monda loĝantaro . . . . .	43
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	40

JARABONTARIFO	Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugalia	Esc	400		
Aŭstralio	ŜA	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZ\$	6.70	Usono	US\$	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$	7.20
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:										£ 2.20 US\$ 4.30							
										Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00							

# KIEL ĈINIO ŜPARIS ENERGIION?

**E**N 1982 la produktokvanto de energio en Ĉinio jam atingis 650 milionojn da tunoj da norma karbo kaj okupis la kvaran lokon en la mondo. Sed, la nuna energia produktokvanto ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la senĉesa disvolviĝo de la nacia ekonomio. Tial, la nesufiĉo de la energio jam fariĝis grava faktoro bridi la ekonomian disvolviĝon.

La politiko por solvi la energian problemon estas ekspluati novajn fontojn kaj ŝpari energion. Laŭ la plano de naciekonomia disvolviĝo la duono de la energia kvanto bezonota por la industria kresko en la nuna jarcento devenos de energi-ŝparo. Tio estas unu el la plej efikaj rimedoj por mildigi la energian streĉitecon.

Dum longa tempo, la energia uzad-proporcio en Ĉinio estas malalta, la uzado estas neracia, kaj ekzistas serioza malŝparo. En 1981, unu tuno da norma karbo

\* La aŭtoro estas estro de la Ĉina Energia Konsilantaro.

produktis ekonomian valoron de nur 576 juanoj, kiu estis ne nur multe malpli alta ol tiu de la disvolviĝintaj industriaj landoj, sed ankaŭ malpli alta je 30-40% ol tiu de la disvolviĝantaj landoj. La kaŭzo kuŝas en tio, ke la produkta tekniko kaj la administrado estas postigintaj, la entreprena strukturo kaj produktata konsisto neraciaj, la energia prilaborado malalta kaj la energia uzado neracia. Ĉinio faris multajn klopodojn por ŝpari la energion. De 1980 ĝis 1982 Ĉinio ŝparis sume norman karbon de 80 milionoj da tunoj. En 1982 la totala industria produktovaloro kreskis je 7.4%, kvankam la energia produktokvanto kreskis nur je 3.8 procentoj.


## ENERGI-ŜPARO EN LA REORDIGO DE LA EKONOMIA STRUKTURO

De multaj jaroj, la solflanka emfazo de la disvolviĝo de la peza industrio kaj neracia industria strukturo estigis grandkvantan malŝparon de la energio. Laŭ

la nuna ĉina stato, por pliigi saman produktovaloron la energikonsuma kvanto de la peza industrio estas 4-oblo de tiu de la malpeza industrio. Se la proporcio de la malpeza industrio leviĝas je 1% kaj tiu de la peza industrio malleviĝas je 1%, ĉiujare oni povas ŝpari pli ol 5 milionojn da tunoj da norma karbo. Depost 1980 kiam komenciĝis la reordigo de la industria strukturo, Ĉinio jam ŝparis 41 milionojn da norma karbo. La reordigo de la entreprena strukturo estas plenumita per la rimedoj de fermo, ĉesigo, kunigo kaj ŝanĝo de malgrandaj entreprenoj, kiuj havis malaltan ekonomian efikon kaj bezonis multe da krudmaterialoj kaj energio. En 1981, Shandong-provinco fermis nombrojn da malgrandaj petrolrafinejoj kaj fer-ŝtalaj fabrikoj kaj per tio oni ŝparis 600 000 tunojn da norma karbo. Ankaŭ la reordigo de produktaj-konsisto ricevis relative grandan ekonomian efikon. Se la proporcio inter la feraj kaj ŝtalaj produktaĵoj reduktiĝas je







Varm-interŝanĝiloj el spiral-platoj

10% jare, oni do povas ŝpari 7 milionojn da tunoj da norma karbo. En 1981 la proporcio inter la feraj kaj ŝtalaj produktaĵoj en Ĉinio malleviĝis de 102:100 en 1980 al 96:100, kaj pro tio oni ŝparis pli ol 4 milionojn da tunoj da norma karbo. Tio montras, ke dank' al reordigo de produktaĵ-konsisto oni povas multe ŝpari energion.

### ENERGI-ŜPARO EN INTENSIGO DE SCIENCA ADMINISTRADO

En reordigo de la ekonomiaj strukturoj, Ĉinio serioze praktikas scienca administradon super la energio. En la lasta pli ol unu jaro, oni unue enketis la energikonsumon de entreprenoj, kaj poste aplikis multajn rimedojn por racie utiligi la energion. Ekzemple, Sichuan-provinco nuligis la fiks-prezan sistemon por energikonsumo kaj instalas al civitanoj elektran, akvan kaj gasan mezurilojn, tiel ke duoniĝis la konsumanta kvanto

de elektro. La livero de difinita energiokvanto al entreprenoj ankaŭ akiris bonan efikon. En la urboj Ŝanhajo kaj Pekino kaj la provincoj Zhejiang kaj Jiangsu efektiviĝis la sistemo de livero de difinita energiokvanto al entreprenoj, premio de ŝparo, pagigo de pluskosto por superkonsumita kvanto kaj garantia provizo al bone funkciantaj entreprenoj. Dank' al tio oni efike bridis la energio-konsuman kreskadon. En la unuaj 11 monatoj de 1982 Jiangsu-provinco ŝparis 350 milionojn da kilovatt-horoj kaj antaŭtempe plenumis la jaran elektro-ŝparan planon. Lastatempe en Ĉinio oni faris ĝeneralan energiokonsuman enketadon al la entreprenoj. Sur la bazo de la enketado oni aplikis rimedojn por raciigi energio-distribuon al la entreprenoj. Nun, la urbo Ŝanhajo jam faris ĝeneralan enketadon al 56% de la entreprenoj, kiuj konsumas energion de pli ol 5 000 tunoj da norma karbo ĉiujare. Ilia sperto montras, ke utiligante la ĝeneralan energiokonsuman enketadon

oni povas levi la energian efikecon ĝenerale je 1-2% kaj eĉ 3-5% por iuj entreprenoj.

### ENERGI-ŜPARO EN TEKNIKA RENOVIGO

Fari scienca administradon super la energio estas tre necese, sed ties efiko estas limigita. La radika metodo por solvi la energian problemon dependas de la teknika renovigo kaj apliko de novaj sciencoj kaj tekniko.

Unue, oni devas bone kaj komplete reformi la entreprenojn. Por daŭre fari energian ŝparadon oni devas aktive esplori kaj apliki, laŭ karakteroj de sia entrepreno, la avangardajn produktan teknologiojn kaj teknikajn instalaĵojn. Surbaze de tio oni ellaboras la planon de komplete teknika reformo. La Anshan-a Fera kaj Ŝtala Kompanio decidis fari 65 teknikajn reformojn en la Sesa Kvin-jara Plano de la Nacia Ekonomio (1981-1985). Ĉiflanke ili reformos 60 industriajn fandfornojn,

ŝanĝos 26 kaldronegojn funkcigatajn per mazuto en tiujn per karbo kaj konstruos nombron da akcesoraj konstruaĵoj por maŝinriparado, energioprovizado kaj transportado. Sole per tiu reformo oni povos ŝpari 380 000 tunojn da norma karbo jare.


Due, oni devas fari renovigon de la produkta teknologio kaj anstataŭigon de malnovaj ekipaĵoj per la novaj. Laŭ la principo de malalta produktokosto, rapida efikodono kaj granda fruktodono, oni faras partan aŭ tutan reformon al la teknologio kaj ekipaĵoj. Ekzemple, la Nankina Kemia Fabriko teknike reformis siajn instalaĵojn por produkti anilinojn, kio mallevis vaporkonsumon de 6.2 tunoj al 1 tuno kaj la elektrokonsumon de 340 kilovatt-horoj al 130 kilovatt-horoj. Tiu normo jam atingis la avangardan energio-konsuman nivelon de la samspecaj instalaĵoj eksterlandaj. La valoro de la ŝparitaj vaporo kaj elektro en unu jaro atingis 0.16 milionon da juanoj kaj la 0.23 milionon da juanoj por reformi la instalaĵojn estis reprenita post 18 monatoj. La alia rimedo estas anstataŭigo de malmoder-

naj kaj energio-multekonsumaj ekipaĵoj per la modernaj. La Panzhuhua-a Ŝtala Fabriko en Sichuan-provinco sukcese kreis novan teknologion per kio oni povas ŝpari 3 500 tunojn da norma karbo ĉiujare kaj levi la produktan kapablon de la varmoegaliga fornego je 30%, kio profitodonas 4.5 milionojn da juanoj ĉiujare. La lasta rimedo estas plifortigo de la scienca esplorado pri la energioŝparo, precipe pri la ŝlosila scienca kaj teknika problemo por levi energioŝparan efikecon. En la Sesa Kvinjara Plano, Ĉinio metas grandan atenton sur jenajn esplorajn problemojn: levi la efikecon de hejtaĵo kaj varmo; anstataŭigi la energio-konsumajn instalaĵojn de industriaj kaldronegoj kaj aŭtoj per novaj; fabriki aparatojn pri mezurado, ekzamenado kaj regado de energio-konsumo; apliki sintezan energio-ŝparan teknikon por altfornoj; utiligi superfluan varmon; plimultigi la uzadon de la cirkvitoj ktp., kio espereble levos la energioŝparon al nova nivelo.

Trie, oni devas serioze disvastigi novajn teknikojn, kaj teknologiojn kaj uzi novajn ekipaĵojn por la energioŝparo. Ili

jam estas uzataj de multaj entreprenoj en la lando en la lastaj kelkaj jaroj. Ekzemple, en 1981 kaj 1982 Yunnan-provinco pagis milionon da juanoj por reformi 30 000 malnovajn aŭtojn, kiuj multe konsumis la energion. Sole dank' al la reformado de la bas-kulkovrilo, karburilo, en-kaj el-lastuboj kaj aliaj maŝinpecoj oni povas ŝpari oleon je 10-15%. Se ĉiu aŭto ŝparas 8% de la konsumata oleo jare, la provinco povas ŝpari ĉ. 18 000 tunojn da oleo jare. En 1982 nia lando elektis 174 avangardajn energioŝparajn teknikojn kaj disvastigis ilin en multaj lokoj laŭ la konkretaj kondiĉoj.

Ĉinio havas vastan vojon por ŝpari la energion. Por rapide disvolvi la nacian ekonomion, Ĉinio faros pli grandajn klopodojn en tiu flanko.



### *Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino*

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	30.1	9965
			26.2	11445
			19.8	15110
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin-Ameriko	26.0	11515
			19.2	15600
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	30.4	9860
			19.8	15100
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	19.7	15165
			16.9	17745



# SUNENERGIAJ FORNOJ EN ĈINIO

**L**A nomitaj fornoj, ŝatataj de la kamparanoj, populariĝas en nombro da ĉinaj vilaĝoj, dank' al kio oni ne plu suferas de manko de brulaĵoj.

La statistiko montras, ke en la ĉina kamparo ĝenerale mankas brulaĵoj en 2-3 monatoj ĉiujare, kaj en iuj regionoj la manko daŭras eĉ pli ol duonjaron.


La gubernio Yongjing de la provinco Gansu, kiu situas sur la Leŭsa Altebenaĵo en nordok-

cidenta Ĉinio, prezentis bonan ekzemplon tiuflankan. La tieaj brulaĵoj, kiujn la kamparanoj kolektis jare, sufiĉis nur por unu-monata kuirado, kaj en la ceteraj tagoj ili devis serĉi herbajn kaj arbajn radikojn por kuirado. Sed nun ili ne plu zorgas pri la manko de brulaĵoj; sunenergiaj fornoj videbliĝas ĉie en vilaĝaj kortoj, lernejoj, oficejoj, hospitaloj, butikoj kaj eĉ moskeoj. En la tuta gubernio troviĝas pli ol 18 000 tiaj fornoj

kaj 72.3% de la kamparanaj familioj jam ilin uzas.

La gubernio, kie la suno brilas 2 500-2 900 horojn jare, estas riĉa je sunenergio, kaj tie sunenergiaj fornoj povas esti uzataj en ĉirkaŭ 210 tagoj. En 1979 sciencistoj kaj teknikistoj de la gubernio komencis koncernan esploron kaj fine elfaris paraboloidan eksteraks-fokusan sunenergian fornon, kiu konsistas el sablocementa ŝelo fortikigita per internaj feraj dratoj kaj kondensoro el arĝentita vitro. La kuiril-tenilo de la forno estas aparte manipolata, tiel ke oni povas alĝustigi la altecon de la kuirilo kaj la klinecon de la forno respektive laŭ la varia angulo de la sun-prilumado. Por fari unu tian fornon oni bezonas nur 35 kg. da cemento, 22.5 kg. da ŝtalo kaj 1.7 kvadratajn metrojn da arĝentita vitro. Kvankam iom peza, ĝi kostas nur ĉirkaŭ 60 juanojn (kiuj egalas al 30 usonaj dolaroj), se pogrande produktite. Ĝia varmefiko egalas al unu-kilovatta elektra forno, kiu povas boligi 3-4 kg. da akvo en 20 minutoj. La sunenergia forno sendube portas al kamparanoj grandan oportunecon en ilia ĉiutaga kuirado kaj furaĝo-preparado. Nun ĝi jam

*Sunenergia forno el spongeca vitro*





*Sunenergia desinfektilo*

estas necesajo por ilia vivo, kaj iuj eĉ prenas ĝin kiel doton por siaj filinoj.


Diversspecaj estas sunenergiaj fornoj, kaj interalie la kondensoraj, ĝenerale kun ŝelo el cemento aŭ vitroplasto, estas la plej popularaj. Jen kelkaj sukcesaj specoj:

La faldebla, 65-kg-a forno kun ŝelo el fortikigita cemento kaj lumkolekta areo de 2.42 kvadrataj metroj, povas kuiri unu kg.

da rizo en 35 minutoj kaj friti 6 ovojn en 4 minutoj, se la intenso de la suna radiado ne estas malpli ol 720 grandaj kalorioj sur ĉiu kvadrata metro. Ĝi povas translokiĝi facile kaj kostas nur ĉirkaŭ 50 juanojn.

La kaldron-forma estas garnita per maldika ŝelo muldita el fero aŭ aluminio, kio ebligas eviti la malfacilan formigon, pezecon, deformiĝemon kaj mallongan daŭron de uzado de la sablocementa paraboloida ŝelo.

La special-forma el spongeca vitro pezas 65 kg., kun lumkolekta areo de 2.65 kvadrataj metroj. Por desegni ĝian reflektan kurban surfacon oni, per ekzakta kalkulo, elektis ĝustan pozicion de la rotacia paraboloido, tiel ke ĝia varmefiko leviĝis ĝis pli ol 50% kaj la maksimuma temperaturo ĉe ĝia fokuso povas atingi 990°C. Dank' al la racia aranĝo inter ĝia reflektanta kurba surfaco, ĝia pozicio por manipulado kaj la minimuma angulo de sun-prilumado, ĝi povas esti tutjare uzata — vintre 4 horojn




*Sunenergia forno*

kaj somere 12 horojn ĉiutage — en la vasta regiono inter 40° de norda latitudo kaj 10° de suda latitudo.

Cetere, la bendforma vakue-aluminiita poliestera membrano produktita en Ŝanhajo servas kiel nova reflektanta materialo por sunenergiaj fornoj, tiel ke oni povas eviti la pezecon kaj rompiĝemon de vitraj reflektiloj kaj samtempe redukti la koston. Provoj montris, ke sunenergia forno el tia materialo, kun efika lumkolekta areo de 1.96 kvadrataj metroj, povas boligi 3 kg. da akvo en 35 minutoj.

La sunenergiaj fornoj portas al la vivo de kamparanoj grandan oportunecon kaj efike helpas plenigi la mankon de energio en la kamparo. Ĉinio, el kies tersurfaco du trionoj estas prilumataj de la suno en pli ol 2 000 horoj jare, laŭtakse, povas ricevi ĉ.  $10^{16}$  kilovatt-horojn da sun-energio ĉiujare, kiu egalas al la energio donita de 1 200 miliardoj da tunoj da norma karbo. La nordokcidenta Ĉinio kaj Qinghai-Tibeta Altebenaĵo, kie plej terure mankas brulaĵoj, estas aparte riĉaj je sunenergio, ĉar tie

*Sunenergia banejo*





# MEMORE AL LA 100-A DATREVENO DE LA FORPASO DE KARL MARKS

**E**N la lasta marto multaj urboj de Ĉinio okazigis diversajn aktivadojn por memori la 100-an datrevenon de la forpaso de Marks.

La ses-taga tutlanda simpozio pri Marks inaŭguriĝis en Pekino la 7-an de marto. Ĝin ĉeestis pli ol 1 500 socisciencaj teoriistoj el diversaj lokoj de Ĉinio. Iuj el ili faris prelegon en la simpozio.


La kulmino de tiuj aktivadoj estis la memoriga kunveno kun partopreno de 10 000 homoj, okazigita de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio en la 13-a de marto. La ĉina ĉefministro Zhao Ziyang prezidis la kunvenon. Hu Yaobang, la ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista

Partio de Ĉinio, faris gravan paroladon sub la titolo "La Brilo de la Granda Vero de Marksismo Lumigas Nian Vojon por Antaŭenmarŝi". Li diris: "Nun ni pli profunde komprenas, ke sen la doktrino de Marks, Ĉinio ne povas fariĝi tia, kia ĝi hodiaŭ estas. Ni devis, devas kaj devos konsulti Marks kaj serioze studi liajn verkojn por ĉerpi el ili saĝon kaj forton."

Oni aranĝis, en la Ĉina Revolucia Muzeo kaj la Ĉina Belarta Domo en Pekino, la "Bildo-ekspozicion pri la Vivo de Marks kaj Engels", la "Ekspozicion de la Verkoj de Marks kaj Engels en Ĉinio" kaj la "Bildo-ekspozicion pri la Vivo de Marks".

Dume ĉinaj diverslokaj ĵurnaloj kaj gazetoj publikigis grandan nombron da tiurilataj artikoloj kaj fotoj, kaj eldonejoj eldonis verkojn kaj biografion de Marks, kaj librojn kaj albumojn pri Marks. La Centra Televida Stacio de Ĉinio projekciis la televidan filmon "Karl Marks en Juneco" produktitan kune de la Germana Demokrata Respubliko kaj Sovetunio. Iu teatro en Pekino prezentis la historian teatraĵon "La Ĉeriza Sezono" (la originala titolo "Pariza Komunumo"). Muzikaj rondoj okazigis koncerton por tio.

Tiuj riĉaj kaj multkoloraj aktivadoj daŭris pli ol dudek tagojn.



la suno brilas 2 800-3 000 horojn jare. Tial, la utiligo de sunenergio en la ĉina kamparo prezentas vastan perspektivon.

*Sunenergia akvovarmigilo*




**Ĉ**INIO estas la kvina lando, kiu lanĉis artefaritan sateliton per sia propra transporta

raketo, la tria lando, kiu posedas teknikon repreni sian lanĉitan sateliton, kaj la kvara lando, kiu

lanĉis plurajn satelitojn per unu transporta raketo.

*Lanĉejo de transportaj raketoj*



#### **AER-SONDAJ RAKETOJ**

En la mezo de la kvindekaj jaroj Ĉinio komencis projekti sian spacan aferon, establis fakan institucion pri raketa tekniko kaj ekkonstruis eksperimentan bazon.

Ekde 1958 Ĉinio entreprenis kaj sukcesis fari unu post alia tri specojn de eksperimentaj meteosondaj raketoj. En esplorado, provfarado kaj eksperimentado de la raketoj, oni akumulis sperton pri fabrikado de raketaj motoroj kaj instrumentoj kaj ekipaĵoj necesaj por la spacaj scienco kaj tekniko kaj por la reprena tekniko, akiris esplorajn donitaĵojn pri la spaca fiziko kaj metis bazon por fari artefaritan sateliton de la tero.

#### **ARTSATELITOJ DE LA TERO**

En 1965 Ĉinio ellaboris planon por fari kaj lanĉi artefaritan




sateliton. Post kvin jaroj, t.e. je la 24-a de aprilo 1970, ĝi sukcese lanĉis kaj surorbitigis sian unuan artefaritan sateliton ekipitan per telemzurilo, spurilo kaj muzikaj-transigilo, kiu elsendis al la tero melodion kaj telemzurajn signalojn riceveblajn per ordinara kurt-onda transistoro.

Poste, en marto 1971, Ĉinio lanĉis sian duan sateliton por scienca eksperimento. Dum sia ok-jara revoluo la satelito senĉese sendas al la tero scienc-eksperimentajn donitaĵojn. Ĉinio unuafoje akiris spac-fizikajn donitaĵojn per tia satelito kun aparatoj por esplori kosmo-radion, X-radion, altitudan magnetokampon ktp. La satelito falis en junio 1979.

Dum 1975-1982 Ĉinio lanĉis sinsekve dek du satelitojn por scienca esploro kaj teknika eksperimento kaj sukcese reprenis en sia teritorio kvar el ili, kio montris, ke Ĉinio atingis novajn sukcesojn en tekniko de orbita gvidado kaj retro-raketo kaj pri varm-rezistaj materialoj. La eksperimentoj havigis al Ĉinio multajn donitaĵojn pri teknologio de satelito kaj pri spaca telesenso kaj spaca esplorado, donis valorajn materialojn por apliki telesenson en ĉiuj kampoj de la nacia ekonomio kaj plue levis la kapablon projekti kaj fari satelitojn kaj transportajn raketojn.

### TRANSPORTAJ RAKETOJ

Fari grandan transportan raketon estas premiso de disvolvado de astronautiko. En la unuaj jaroj de la sesa jardeko Ĉinio komencis tiun laboron, kaj en la lastaj jaroj de la sama jardeko ĝi jam povis lanĉi certan kvanton da satelitoj. Majon de 1980 ĝi lanĉis grandan transportan raketon al Pacifiko, kaj oktobre de 1982




*Surtera satelitspurada stacio*

ĝi lanĉis el-subakve transportan raketon al antaŭfiksita oceano, kio montris, ke ĝia tekniko de transporta raketo atingis novan nivelon.

En septembro 1981 Ĉinio unuafoje lanĉis transportan raketon, kiu portis tri satelitojn por spac-fizika esploro en orbitojn ĉirkaŭ la tero. Tio faris Ĉinion la kvara lando post Usono, Sovetunio kaj Francio, kiu posedas teknikon lanĉi plurajn satelitojn per unu raketo. La sukceso de Ĉinio ludis pozitivan rolon en ĝia esplorado de spaca fiziko kaj radiokomuniko.

### APLIKO DE LA SPACA SCIENCO KAJ TEKNIKO

Ĉinio estas en disvolvado de sinkrona orbita komunika satelito kaj polusa orbita meteo-satelito kaj en esplorado de pluraspecaj telesensaj ekipaĵoj. Samtempe Ĉinio dediĉis grandan forton al apliko de satelito. Ekzemple, Ĉinio konstruis en 1974 la importitan A-tipan surteran stacion de la internacia komunika satelito kaj ricevis bonan efikon en transsendo de telegramoj, telefonaĵoj kaj televidaj programejoj. Por akomodigi al la disvolviĝo de komunika satelito, Ĉinio



*Raketo lanĉita*

projektis kaj sukcese faris surterajn komunikajn staciojn, respektive kun antenoj de diametro de kvin, dek kaj dek kvin metroj. Inter majo 1978 kaj julio 1979 Ĉinio, Francio kaj FR Germanio kune utiligis la sateliton "Simfonio" por fari eksperimentojn pri telekomunikado de novaĵoj, radio- kaj televid-programoj kaj transsendo de paroloj el analogaj kaj ciferaĵoj telefonoj.

En 1970 Ĉinio komencis meteorologian esploron pere de satelito. Pere de sia satelita nubobilda ricevilo ĝi ricevis nubobildojn senditajn de usona


kaj japana meteorologiaj satelitoj. La veter-informoj faritaj per tiaj materialoj havigis bonan ekonomian efikon al terkulturo, akvo-mastrumado, mar-navigado, aviado kaj fiŝkaptado.

Surbaze de la praktika enketo pri tipa regiono, koncernaj ekonomiaj departementoj de Ĉinio sukcese aplikis telesensajn materialojn, akiritajn pere de satelito, al enketo pri surteraj riĉfontoj, arbara kontrolo, regiona geologia enketo, hidrologia enketo, prospektorado, sismologia prognozo, mara enketo kaj media kontrolo.

Krome, Ĉinio disvastigis ankaŭ al aliaj branĉoj la unuopajn esplorajn fruktojn de spaca tekniko. Ekzemple, oni faris kontraŭhajlajn raketojn per tekniko de spacsonda raketo, aplikis varmo-regan teknikon al kuracado kaj sun-energia utiligo kaj aplikis porsatelitan silician sunan baterion al fervoja trafiko, surakva transporto kaj senhoma mikroonda stacio.

Ĉinio relative malfrue komencis disvolvi sian spacan teknikon, kaj tial havis pli malaltan bazon, nature inter Ĉinio kaj la avangardaj landoj ankoraŭ ekzistas granda diferenco. Nun al Ĉinio mankas monsumo por tiuflanka esploro kaj ĝi povas unue disvolvi la praktikan kaj urĝbezonan spacan teknikon.

Ĉinio disvolvas la spacan teknikon por modernigi siajn agrikulturon, industrion, nacian defendon kaj sciencojn kaj teknikon, por feliĉo de sia popolo, sed ne por partopreni en spaca konkurso. Ĉinio emfazas lerni de aliaj landoj kaj disvolvas internacian kunlaboron kaj interŝanĝon. Ĝi partoprenis en diversaj aktivadoj aranĝitaj de koncernaj organoj de UNO, kio akcelis la disvolviĝon de ĝia spaca afero.







# Fangshan – Restoracio kun Gusto de Ĉinaj Palacaj Manĝaĵoj

de ZHENG ZHENJIE

**Ĉ**I-JARE en Pekino la frua printempo estis agrable varmeta. Matene je la oka kaj duona horo la sunradioj jam trapenetris la maldensan nebulon kaj plenkovris la Blankan Pagodon de la parko Beihai.

Surborde de la lago Beihai troviĝas la restoracio Fangshan, kiun mi volis viziti. Ĝi speciale preparas pladojn kun gusto de palacaj manĝaĵoj de la lasta dinastio Qing en Ĉinio.

## LAŬPALACE MEBLITAJ MANGOĈAMBROJ

Fangshan signifas en la hana lingvo prepari pladojn kaj manĝaĵojn imite al la manĝaĵ-preparado de la imperiestra kuirejo en la palaco.

Enirinte la pordon de la restoracio, mi tuj vidis tri ideografiaĵojn “Yilantang” sur la ŝildo, skribitajn de la imperiestro Qianlong (1735-1796 en trono) de Qing-dinastio. Antaŭ ĝi estis ripozejo de la imperiestroj de Qing-dinastio kaj iliaj familianoj. Ambaŭflanke de la pordo pendas du lignaj tabuloj kun

ideografiaĵoj skribitaj de Pugie (frato de la lasta imperiestro Ajsin Gjoro Puji abdikita en 1911) signifantaj “La restoracio Fangshan kun gusto de palacaj manĝaĵoj”.

Akompanate de ĝia vicdirektoro Pang Changhong, mi vizitis ĝiajn manĝoĉambrojn konstruitajn kaj aranĝitajn laŭ la palaco de Qing-dinastio. La restoracio kun plank-areo de 2 224 kvadrataj metroj havas 11 grandajn kaj malgrandajn manĝoĉambrojn, kiuj troviĝas en tri elegantaj kortoj. La ĉambroj kun vermiljonaj kolonoj estis dekoraciitaj per palacaj lanternoj, ore kaj bunte desegnitaj plafonoj, gravuritaj ligno-ekranoj kaj helflavaj fenestraj kurtenoj.

## FESTENO EL HANAJ KAJ MANĈURAJ PLADOJ

Antaŭ la vizito mi legis materialojn pri palacaj manĝaĵoj. Ĉi tie du homoj estas menciindaj: la imperiestro Qianlong frandema kaj distrema kaj la imperiestra patrino Cixi ekstreme luksema (ŝi uzurpis la ŝtatan potencon

kaj fariĝis reala reganto de Ĉinio inter 1861—1908). Tiam la imperiestra kuirejo de Qing-dinastio atingis tre altan nivelon en gastronomio, precipe en preparado de pladoj el manĝebla nesto formita el sekrecio de birdo, ŝarka naĝilo, urso plando, cerva viando kaj aliaj frandaĵoj, tion kaŭzis severa postulemo de la du supre menciitaj homoj. La manĝaĵoj preparitaj de la imperiestra kuirejo ĝenerale estis dividitaj en du partojn: ĉiutagaj kaj festenaj. Laŭ la difinoj de la palaco la ĉiutaga manĝo inkluzivis almenaŭ kelkdek pladojn kaj grandan kvanton da vino, teo kaj fruktoj kiuj plenigis kvin aŭ ses tablojn. Sed imperiestro kaj liaj edzinoj manĝis nur kelkajn pladojn proksimajn al siaj sidlokoj, kaj la aliaj servis nur por plezurigi kaj honori ilin. En grava festotago la palaco okazigis grandan festenon. Ekz., en 1785 la imperiestro Qianlong, por celebri la 50-an datrevenon de sia surtroniĝo, aranĝis festenon kun 800 tabloj. Por montri siajn potencon kaj riĉecon, li ordonis, ke la imperiestra kuirejo



preparu diversajn frandaĵojn el raraj lokaj produktaĵoj tributitaj de la tuta lando por regali la korteganojn. La imperiestro estis manĉuro, sed al li tre plaĉis la hanaj pladoj. Li do ordonis prepari festenon el manĉuraj kaj hanaj pladoj.

Kiam mi parolis kun vicdirektoro Pang, kelneroj jam surtabligis manĉurajn kaj hanajn pladojn. Tiam mi rimarkis, ke la pladoj estis preparitaj el kvarspecaj materialoj: ok raraj birdoj: tetrao, fazano, koturno kaj aliaj; ok raraj marproduktaĵoj: manĝebla birda nesto, ŝarka naĝilo, granda holoturio, naĝveziko de ŝtonkapa fiŝo, halioto kaj aliaj; ok raraj montproduktaĵoj: ursa plando, simia kapo, cerva tendeno kaj aliaj; ok raraj plantoj: hidno, blanka orefungo, agariko kaj aliaj. Vicdirektoro Pang diris al mi: "Fangshan nun preparas pladojn laŭ la gastronomio de la imperiestra kuirejo, kaj ĝia kuirarto estas eĉ pli alta ol tiu de la lasta."

Baldaŭ kelneroj surtabligis supon el blankaj orefungoj kaj kukojn delikate preparitajn el piza faruno k.a., el kiuj malgranda *vovotoŭ* estas multe ŝatata de klientoj. Ĝi nur 5 gramojn peza estas farita el maiz-kaj fabfaruno, sukero kaj osmanto-flora akvo kaj havas konusan formon kun truo en la fundo. Pri ĝi cirkulas rakonto jena:

En 1900, kiam la ok-landa alianca armeo entrudiĝis en Pekinon, la imperiestra patrino Cixi fuĝis panike. Survoje mankis al ŝi manĝaĵo. Iu donis al ŝi *vovotoŭ* el kruda maizfaruno (manĝaĵo por ordinaraj popoloj en norda Ĉinio). La malsatega Cixi sentis ĝin tre bongusta. Post kiam ŝi revenis al Pekino kaj ne plu ŝatis luksajn manĝojn, ŝi ekmemoris *vovotoŭ*. La imperiestra kuirejo timis, ke Cixi ne plu havas tian apetiton por manĝi tian manĝaĵon. Post cerbumado la kuiristoj preparis por ŝi la supre menciitan malgrandan *vovotoŭ*.

Interparolante kun la vicdirektoro, mi gustumis la frandaĵojn kaj iom spertis la gustojn de imperiestraj manĝaĵoj.

## LA TRIA GENERACIO DE IMPERIESTRAJ KUIRISTOJ

En la kuirejo de Fangshan, mi konatiĝis kun 47-jara ĉefkuiristo Dong Shiguo. Li komencis lerni de Wang Jingchun kuirarton en sia aĝo de 14 jaroj. Wang estis metilernanto de Sun Shaoran, kuiristo de la imperiestra kuirejo de Qing-dinastio. Nun Sun kaj Wang jam forpasis, Dong Shiguo fariĝis la plej lerta kuiristo de Fangshan.

Dong diris al mi, ke krom la palacaj pladoj, Fangshan ankaŭ preparas famajn pladojn de diversaj lokoj de Ĉinio. Li diris al mi ankaŭ, ke post nelonge li veturos al Japanio por prezenti la ĉinan kuirarton. Tian vojaĝon trimonatan li faris invitite al Ĉikago, Novjorko kaj San-Francisko de Usono en 1980. La admirado de fremdlandaj amikoj pri la ĉinaj palacaj pladoj multe lin ĝojigis.



*Kuiristo en preparado de pladoj*

*Qian Xinzhong*



Qian Xinzhong, prezidanto de la Stata Komisiono por Naskolimigo de Ĉinio, gajnis la 1983-jaran loĝantaran premion de UN. Ankaŭ Indira Gandhi, ĉefministro de Hindio, gajnis tiun premion. Tio estis proklamita de la prezidanto de la Komisiono de Loĝantara Premio de UN, en la 18-a de marto. Tio estas la unuafoja loĝantara premio de UN. La premia ceremonio estis okazinta en la ĝenerala stabo de UN en Novjorko. Ĉiu premiito ricevis meritateston, oran medalon kaj premion de 12 500 usonaj dolaroj.

Laŭ la anonco Qian Xinzhong faris kontribuon en ellaboro kaj propagando de la politiko pri naskolimigo de Ĉinio kaj en organizado de medicinaj laborantoj kaj sciencistoj por esplori kaj liveri koncipopreventilojn, kio reduktis la naturan loĝantarkreskon de 2 procentoj en la komenco de la 50-aj jaroj ĝis 1.45 procentoj en la lasta duono de la 70-aj jaroj kaj la meza vivdaŭro de la loĝantoj plilongigis 28 jarojn, t.e. de 36 jaroj en 1949 ĝis 68 jaroj en 1981.

#### **LA AKVO DE JANGZI-RIVERO KONDUKOTA AL NORDO**

Jangzi-rivero fluas de okcidento al oriento, sed nun oni planas kon-

duki parton de ĝia akvo norden al la urbo Jinan en Shandong-provinco laŭ la Granda Kanalo, dank' al kio malfermiĝos la orienta akvovojo inter Jangzi-rivero kaj la Flava Rivero.

La konstruado en la unua etapo celas ŝanĝi la akvomankan staton en la ebenaĵo malsupre de Huai-, Yi-, Si- kaj Wen-riveroj.

La ĉefa akvokonduka linio kun totala longo de 646 km. estos konstruita surbaze de la larĝigota Granda Kanalo kaj plena utiligo de la jam konstruitaj Jiangdu-a kaj Huai'an-a Pump-stacioj kaj aliaj instalaĵoj. Post la finiĝo de la konstruado la linio povos provizi la ĉebordajn urbojn, fabrikojn kaj minejojn kaj river-trafikon per 2.1 miliardoj da kubmetroj da akvo, mildigi la akvolivecan streĉon en irigaciado de 1.4 milionoj da hektaroj kaj irigacii 933 400 hektarojn da rizkampoj. La parto de Yangzhou ĝis Jining estos navigebla tutjare. La karbo de Shanxi, Shandong kaj norda Jiangsu povos esti ŝipe transportata al Ŝanhajo kaj aliaj urboj.

#### **VASTE UTILIGATAJ GEOTERMOFONTOJ EN LA AGRIKULTURO**

De la lastaj jaroj Ĉinio aplikas geotermofonton en la agrikulturo kaj aliaj flankoj. Laŭ kalkulo de specialistoj la geotermika varmkvanto uzata jare en la agrikulturo egalas al tiu de 3 milionoj da tunoj da karbo.

Ĉinio estas riĉa je geotermofontoj. Nun troviĝas sume pli ol 2 600 termofontoj kaj ĉ. 130 artefaritaj termoputoj en 29 provincoj, aŭtonomaj regionoj kaj municipoj tra la lando.

#### **DAŬRA KRESKO DE ENSPEZO**

La pokapa enspezo de la urbaj laboristaj familioj en 1982 meznombro atingis 500.28 juanojn, kun neta pliiĝo de 5.8% kompare kun tiu en 1981.

La familioj, kies pokapa monata enspezo atingis pli ol 50 juanojn,

kreskis de 18.4% en 1981 al 24.4% en 1982.

La kaŭzoj pri la kresko estas jene: Pli multaj familianoj akiris laboron, la salajro de parto de la laboristoj kaj oficistoj plialtiĝis kaj la monpremio kaj laŭpeca salajro plimultiĝis.

#### **LERNEJOJ DE LABORISTOJ KAJ OFICISTOJ FONDITAJ EN MULTAJ LOKOJ DE ĈINIO**

Nun en Ĉinio 70 procentoj de entreprenoj kaj institucioj fondis lernejojn kaj diversajn kursojn por lernigi al milionoj da funkciuloj, laboristoj kaj oficistoj sciencon, teknikan kaj kulturen sciojn.

La kompletiga instruado al junuloj kaj mezaĝuloj rapide disvolviĝas tra la lando.

Ankaŭ diversnivelaĵaj laboristaj sindikatoj, sciencaj kaj teknikaj asocioj, akademijaj societoj kaj la Ĉina Profesio-eduka Asocio funkciigas kursojn. Nun la nombro de la lernejoj funkciigataj sole de la diversnivelaĵaj laboristaj sindikatoj jam atingis 1 376, kun 850 000 lernantoj.

#### **MEMORE AL JULIUS FUĈIK**

La 11-an de marto 300 pekinanoj kunvenis por rememorigi pri Julius Fuĉik, nacia heroo kaj revolucia verkisto de Ĉeĥoslovakio, okaze de la 80-a datreveno de lia naskiĝo.

*Julius Fuĉik*



En 1903 J. Fuĉik naskiĝis en laborista familio en Praha. Por defendi la sendependecon kaj dignon de la patrujo li oferis sian vivon en 1943. En la karcero de nazioj li skribis senmortan verkon "Riporto Skribita en la Pendumila Maŝo" per paperpecoj kaj krajonstumpoj. La verko siatempe donis grandan influon al ĉinaj junuloj. Hodiaŭ pluraj Esperantaj kursoj en Pekino studas ĉapitrojn el ĝia traduko en la internacia lingvo.

### LA 160-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE PETÖFI SÁNDOR

Okaze de la 160-a datreveno de la naskiĝo de granda hungara poeto Petöfi Sándor la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Ĉina Verkista Asocio okazigis memorkunvenon je la 15-a de marto.

Dum sia mallonga vivo Petöfi Sándor verkis preskaŭ 800 poemojn, per kiuj li priskribis la mizeran vivon de la laboruloj, malkaŝis la feŭdan socion kaj prikantis la rezistemon de la popolo. Nun liaj verkoj jam estas tradukitaj en pli ol kvindek lingvojn. Multaj el liaj verkoj, inkluzive de "Johano la Brava" estas tradukitaj en la ĉinan lingvon pere de Esperanto.

*Petöfi Sándor*



## Li Shijun fariĝis membro de la Akademio de Esperanto



Li Shijun (Laŭlum), membro de la Konstanta Komitato de ĈEL kaj vicĉefredaktoro de EPĈ, estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto en marto ĉi-jare.

Li Shijun eklernis nian lingvon en la Chongqing-a Koresponda Esperanto-lernejo en 1940. En la pasintaj pli ol 40 jaroj, li entuziasme sin okupis pri disvastigo de Esperanto. Nun li estas ankaŭ vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj estro de ĝia eduka komitato kaj gvidas la porinstruistan Esperanto-kurson fonditan de ĈEL.

Frue en la kvardekaj jaroj, Li Shijun helpis faman esperantiston Eltunko redakti la felietonojn «Lingva Disaŭdigo» kaj «Verda Folio» kaj la gazeton «Ĵurnalistoj». Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, li sin okupas per tradukado kaj lingva polurado en la redakcio de EPĈ. Krom artikoloj en EPĈ kaj parto de "Ĉina Antologio" kaj "Noveloj de Lusin", li esperantigis ankaŭ la verkojn "Aŝma", "Aŭtuno en la Printempo", "Knabino kaj Papago", "Pri Praktiko" kaj "Pri Popol-demokratia Diktaturo".

Nun la akademio havas 45 membrojn. Laŭ la statuto de la akademio, inter la 20 ĉi-foje reelektitaj akademianoj estas 5 novaj. La unuaj 15 akademianoj, inter kiuj Li Shijun okupas la okan lokon, funkcias en tempodaŭro de 9 jaroj. En la meza periodo de la dudekaj jaroj, ĉina esperantisto Won Kenn estis elektita kiel membro de la Lingva Komitato (la antaŭa nomo de la akademio). Li Shijun estas la dua ĉino elektita kiel ĝia membro.

La aliaj nove elektitaj akademianoj estas Golden, Tonkin, Daŝgupto kaj Sherwood.



YANG KAIYUAN:

# Esperanto en la Ĉina Internacia Turisma Konferenco



*Yang Kaiyuan (la unua de dekstre), Risabro Murakami (la dua de dekstre) kaj nia raportisto Zhou Dongyuan (la unua de maldekstre) en la festeno*

**L**A Ĉina Vojaĝa kaj Turisma Administra Buroo kaj la Civila Aviada Administracio de Ĉinio kune okazigis en Pekino Internacian Turisman Konferencon de la 28-a de februaro ĝis la 4-a de marto ĉi-jare. Kiel reprezentanto de la turisma buroo de Hunan-provinco, mi ĉeestis ĝin, tiel ke mi havis ŝancon montri la vojaĝliniojn de nia provinco al alilandaj gastoj kaj niaj kolegoj kaj fari kun ili interparoladon pri turisma afero.

La konferenco estas bona ŝanco por mi uzi la lingvon Esperanto, tial mi ekportis sur mia brusto la verdan stelon. En la unua tago de la konferenco kelkaj fremdlandaj gastoj rimarkis ĝin kaj diris al mi Esperante: “Bonan tagon!” “Tre bone!” “Dankon”. Estis bedaŭrinde, ke ili nur iomete parolis Esperanton, kaj ni interparolis malmulte. Tamen mi esperis, ke mi renkontos en la konferenco alilandajn samideanojn laborantajn pri la internacia turisma afero, almenaŭ simpatiantojn de nia lingvo. Tiuvespere, okazis bankedo en la Popola Halo, kaj mi sidis ĉe tablo kune kun la francaj gastoj. Ni interparolis pere de franclingva interpretisto. La gastoj ĉiuj sin montris ĝojaj pro

partopreno en la konferenco. Subite, iu stariĝis kaj venis al mi. Montrante la verdan stelon sur mia brusto, li diris: “Estas bone, ke vi parolas Esperanton.” Li donis al mi sian vizitkarton, dirante: “Mi estas Duchene Philippe, administranto de Terrien-vojaĝservo de Francio.” Ankaŭ mi donis al li mian karton kaj min prezentis, ke mi estas direktoro de la turisma servo de Changsha kaj vicprezidanto de la Hunan-a Esperanto-Asocio. Mi proponis, ke lia vojaĝservo organizu francan esperantistoturistan grupon al Ĉinio. Li konsentis kun mi kaj elprenis alian vizitkarton, kaj skribis kelkajn vortojn sur ĝia dorso. Li diris al mi: “Mi konigu al vi la nomon de mia frato. Li estas respondeculo de la Esperanto-centro de Baugé, Francio. Mi diros al li, ke mi renkontis en la Popola Halo en Pekino ĉinan esperantiston, kiu okupiĝas pri la internacia turisma afero. Mi certe petos lin organizi vojaĝgrupon al Ĉinio por la francaj esperantistoj.” Mi ĝoje akceptis la karton kaj legis

sur ĝia dorso: “Esperanto-Céner. Bp8, 49150, Baugé. Francois Duchene.” Mi esprimis mian dankon kaj deziron kunlabori kun ili en disvolvado de la turisma afero inter Ĉinio kaj Francio kaj klopodi por antaŭenigi amikecon inter la du landaj esperantistoj.

Poste, en interparolado kun miaj alilandaj kolegoj mia verda stelo multfoje vekis atenton ĉe ili. Kiam ili demandis, kion simbolas la insigno, mi klarigis tion al ili. Informiĝinte pri Esperanto, ili estis ĝojaj kaj dankaj. Mia konigo de Esperanto al eksterlandanoj en nia ĉefurbo pluaŝe konvinkis min, ke la perspektivo de Esperanto estas brila.

En la lasta tago de la konferenco, Jiao Ruoyu, la tiama urbestro de Pekino, donis feston en la Pekina Hotelo por regali la kunvenantojn kaj festi la plenan sukceson al la konferenco. En la festeno mi renkontiĝis kun mia malnova amiko sinjoro Risabro Murakami, Hankyu-Express International Co. Ltd., Japanio. Li plurfoje gvidis vizitgrupojn al Ĉinio. En

letero mi iam proponis, ke li organizu Esperantan turistan grupon al Ĉinio, kio kompreneble okupis la ĉefan lokon en nia interparolado. Li refoje esprimis, ke li sin okupos pri tiu afero tuj post reveno al Japanio. Ĝuste tiam venis raportisto de la redakcio de El Popola Ĉinio kaj Gong Peikang, esperantisto de la Ĉina Vojaĝa kaj Turisma Administra Buroo. Ni ĉiuj esprimis, ke ni klopodos por prosperigi la Esperantan movadon, kaj trinkis pro la amikeco inter la popoloj kaj esperantistoj de niaj du landoj.

Dum la konferenco mi ankoraŭ interŝanĝis opiniojn kun miaj kolegoj de iuj provincoj kaj urboj pri apliko de Esperanto en la turisma afero. Poste mi kunsidis kun miaj kolegoj el la urboj Ŝanhajo, Chongqing, Wuhan kaj Kantono kaj la provincoj Liaoning, Jilin kaj Heilongjiang. Ĝin ĉeestis ankaŭ la samideano de la Ĉina Vojaĝa kaj Turisma Administra Buroo. La fame konata japana esperantistino Verda Majo iam postlasis siajn piedsignojn en tiuj lokoj. Ŝi venis al Ĉinio en 1937. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito ŝi batalis kune kun la ĉina popolo kaj aktive partoprenis en disaŭdigado al Japanio kaj en la internacia propagando. En la kunsido ni diskutis por malfermi la vojaĝlinion laŭ la piedsignoj de Verda Majo. Vojaĝante laŭ tiu ĉi linio, oni povos ne nur sate ĝui la belan pejzaĝon de Ĉinio, sed ankaŭ pli bone koni, kiel vivis kaj batalis Verda Majo, la internaciisma batalanto kaj la veterana esperantistino. Oni povos ankaŭ konatiĝi kun la tieaj esperantistoj kaj Esp-movado kaj interŝanĝi



La aŭtoro (la tria de maldekstre) kaj ges-anoj de EPC

ZORKA ENIZAN:

## Mia restado en Ĉinio

**L**A 15an de julio 1982 mi atingis pekinan aviadilejon modernan, vastan, lumplenan, bone organizitan. Enirante la ejon en kiu oni reakiras valizojn, mi rigardis al la vitrumita parto de ĝi. Tie staris amaso da bonvenigantoj. Por mi ankaŭ signis du amikaj manoj. Estis du junaj studentinoj de la franca lingvo kun kiuj mi korespondas de du jaroj. Ili ellitiĝis je la 5-a mate ne por veni renkonten al mi. Estis nia unua renkontiĝo. Ni gluis amike niajn manojn vidalvide malgraŭ la vitroj. Estis mia unua kontakto kun la ĉina popolo. Mi ekploris emocie. Mi estis ege feliĉa en tiu momento. Mi tuj eksentis, ke mia restado en Ĉinio estos plensukcesa kaj kortuŝa.

Mi ne eraris. Ĉie kaj ĉiam mi spertis tiun korvarmigan amike-


spertojn en nia afero. Ni ĉiuj montris grandan fervoron al la malfermo de la vojaĝlinio kaj

con. La restado en Pekino, krom mia okupiĝo pri studo de la ĉina lingvo, ebligis al mi koni multajn ĉinajn gesamideanojn, kaj ni fariĝis geamikoj. Mi estas feliĉa pro tio, ĉar ĝis nun mi konis ilin nur per interŝanĝo de leteroj. Mi tutkore dankas tiujn gesamideanojn pro ilia amikeco rilate al mia edzo (kiun ili jam delonge konas rezulte de reciproka korespondado) kaj al mi mem. Nur bedaŭrinde estas, ke mia edzo ne povis kun mi ĉeesti la Esp. renkontiĝojn kaj kunvenojn. Mi neniam povos forgesi la agrablajn momentojn, kiujn ni travivis kune. Mi havis ankaŭ la ŝancon ĉeesti la kunsidon de ĉinaj kaj japanaj gesperantistoj aranĝitan de la Ĉina Esperanto-Ligo. La gesamideanoj ambaŭflanke sukcese kulturis komprenemon kaj amikecon.

volonte liveros ĉiujn oportunojn al la esperantistoj-turistoj en loĝado, vojaĝo kaj kunsido.



# TER-NUKSO



Por komencantoj

de XU DISHAN

**P**OST nia domo estas peco da libera tero. Mia patrino diris: “Estas domaĝe lasi la teron nekulturata. Se vi ŝatas ter-nukson<sup>1</sup>, do ni faru ĝin ter-nuksa kultivejo.” Mi kaj miaj gefratoj kun plezuro akceptis ŝian proponon kaj eklaboris. Ni aĉetis semon, plugis la teron kaj akvumis ĝin. Post kelkaj monatoj ni havis rikolton.

La patrino diris: “Hodiaŭ vespere ni festu nian rikolton. Al la festo ni invitu vian patron, ĉu bone?” Ni ĉiuj jesis. Si preparis kelkajn frandaĵojn<sup>2</sup> el la ter-nuksoj kaj diris, ke ni festu en kiosko<sup>3</sup> de la ĝardeno.

En tiu vespero, la vetero estis ne tiel bona, tamen venis mia patro. Tio estis malofta afero. La patro diris: “Ĉu vi ŝatas ter-nukson?”

Ni unuvoĉe respondis: “Jes!”

“Kiu povas diri al mi la bonojn de la ter-nukso?”

Mia fratino diris: “Ĝi estas bongusta.”

Mia frato diris: “Ĝi donas oleon.”

Mi diris: “Ĝi estas facile aĉetebla pro la malkareco kaj ŝatata de ĉiuj. Tio estas ĝia bono.”

La patro diris: “La ter-nukso havas multajn bonojn, tamen la plej granda estas tio: Ĝi kaŝas siajn malgrandajn grajnoj en la tero, ne allogas homojn per siaj belaj koloroj, kiel pomoj, persikoj kaj grandoj kiuj pendas sur siaj arboj. Ĝi kreskas modeste. Laŭ ĝia aspekto oni ne povas scii, ĉu ĝi jam fruktas. Tion oni povas scii nur kiam ili elradikigas ĝin.”

Ni diris: “Jes.” Ankaŭ la patrino kapjesis.

La patro daŭrigis: “Vi devas fariĝi utilaj kiel la ter-nukso.”

Mi diris: “Do, ni devas esti homoj vere utilaj sed ne vantaj<sup>4</sup>.”

La patro diris: “Tio estas mia espero al vi.”

Ni formanĝis la frandaĵojn kaj disiĝis en profunda nokto, tamen la vortoj de la patro gravuriĝis en mia koro.

## Novaj Vortoj

1. Ter-nukso: unujara planto kun manĝeblaj grajnoj, aŭ ties frukto mem.
2. Frandaĵo: bongusta manĝaĵo.
3. Kiosko: ne-fermita budeto en ĝardeno.
4. Vanta: malmodesta.

Ilustrita de DAI HUIWEN

Krome, mi ĉeestis kunvenon organizitan de la Pekina Esperanto-Asocio kaj grandiozan akcepton kaj samtempe amikan intervjuon aranĝitajn de la Esperanto-Sekcio de Radio Pekino. La intervjuo estis elsendita la 2an kaj 3an de oktobro, kaj tion ni registris sur bendon por aŭdigi ĝin al niaj lokaj gesamideanoj de Rueil, Francio, okaze de proksima kunveno.

En la Pekina Normala Altlernejo por geinstruistoj ĉio estis

zorgata ĝustatempe. Ĉiumatene ni studis la ĉinan lingvon, posttagmeze niaj geprofesoroj akompanis nin al diversaj vizitoj de la urbo, al spektakloj, al fabrikoj, popolaj komunumoj aŭ ekspoziciejoj. Tiamaniere ni konstante kontaktis la ĉinan popolon. Ni multon lernis pri ĝiaj tradicioj kaj nuntempaj problemoj kaj sukcesoj. Ni ĝuis belegajn parkojn kaj vidindaĵojn de Pekino, kaj ni vizitis ankaŭ kelkajn aliajn urbojn kiel Luoyang, Xi'an, Chengdu, Wuhan,

kc. Tiuj vojaĝoj ebligis al ni praktiki la ĉinan lingvon kaj lerni surloke la antikvan kaj freŝdatan historion de la ĉina popolo. Mi estis feliĉa, ĉar mi povis propraokule konstati, kiom serioze la ĉina popolo konstruas sian estontecon. Mi sincere ĝojas pro ĉiu atingo, kiu kontribuas al plibonigo de vivkondiĉoj kaj plialtigo de la vivnivelo en Ĉinio. Mi estas konvinkita, ke la progreso estos rapida, ĉar per tiom da bonvolemo oni devas sukcesi.

## La sufikso por acidoj

**K**EMIA terminaro en naciaj lingvoj kaj tiu en Esperanto iom post iom stabiligas. Jam estas leĝigitaj kaj vaste uzataj jenaj sufiksoj: an — alkanoj, en — alkenoj, in — alkinoj, ol — alkoholoj, oz — sukeroj, az — enzimoj, il — radikaloj, at, it, id — saloj, al — aldehidoj, on — ketonoj. Acidoj ne havas propran sufikson.

Ŝajne jam venis tempo enkonduki en Esperanton specialan sufikson por tiu grava klaso de substancoj. La plej konvena sufikso por acidoj estas ac. Tiu sufikso jam estas prenita por botanikaj familioj sed tio konsiderinde ne gravas — nin ja ne ĝenas alisenca uzado de bazaj Esperantaj sufiksoj en kemio aŭ nesamsenca uzado de sufikso oz en kemio kaj medicino.

Maniero de formado de acidaj nomoj estas jena. En nomo de salo ni anstataŭigu sufikson at per sufikso ac, ekz.: nitrato — nitraco, acetato — acetaco, piruvato — piruvaco. Se nomo de salo havas sufikson it en nomo de koncerna acido ni uzu sufikson ic, ekz.: nitrito — nitrico, sulfito — sulfico, klorito — klorico. Sufikso ic estu uzata nur por neorganikaj oksigenhavaj acidoj. En kunmetitaj nomoj de acidoj ni simple eljetu pseŭdosufikson id, ekz.: amin(o)-acido — aminaco, sulfacido — sulfaco, grasacido — grasaco. Por neorganikaj senoksigenaj acidoj ni uzu radikon hidr, ekz.:

klorhidracido, sulfhidracido, azhidracido, cianhidracido. Iliaj saloj estas respektive klorido, sulfido, azido, cianido.

Ŝajnas racia uzado de nomo aco anstataŭ acido kaj uzado de adjektivo aca anstataŭ acida. Nun oni uzas la vorton acida en du diversaj sencoj: ĝi signifas ion proprecan al acidoj kiel kemiaj kombinaĵoj kaj ĝi ankaŭ esprimas gustan econ de io. Ni konservu la vorton acida (ankaŭ acideta, acidega k.s.) por esprimo de gusteco kaj uzu la vorton aca por ĉio kio rilatas al aco — kemia kombinaĵo kiu emas fordoni hidrogenjono(j)n kaj ne liveras alispecajn katjonojn. Tio ebligas kurtigi multajn terminojn, ekz.: acidorezista — aco-rezista, acidemio — acemio, acida resto — ac(o)resto k. a. Do ni uzu ac ankaŭ kiel prefikso devenanta de la vorto aco.

Nun pri duvorta esprimo de acaj nomoj. Antaŭ kelkaj jaroj redaktoro de MIR profesoro S. Yamazoe deklaris ke nun uzata formo -ata acido (sulfata a., nukleata a., ktp.) estas ne korekta esence. Li pravus centprocente — saloj estas derivaĵoj de acoj sed ne male. Do se ni volas vidi la internacian lingvon logika ni devas decide forĵeti la formon -ata acido(aco), same -ita aco kaj -ida aco. La proponitaj unuvortaj nomoj de acoj logike kondukas al duvortaj iliaj nomoj nukleaco — nuklea aco, klorhidracido — klorhidra aco,

klorico — kloro ico. Komuna nomo estas aco sed por oksigenhavaj acoj de pli malalta valento ni uzu nomon ico, icoj estas malmultaj (malpli ol 1%). En nomoj de organikaj acoj la sufikso ic ne troveblas.

Iom da konsideroj pri insista neceso de enkonduko de speciala sufikso por acaj nomoj. Nun pro manko de tiu sufikso oni uzas salan sufikson at por multegaj acoj kiuj partoprenas metabolon, ekzemple, oni nomas piruvato ne salon de piruva aco sed piruvaco mem, same formiato, okzalato, sukcenato k. a. Pro manko de konvena sufikso oni uzas nomojn hidroklorido, hidrokromido k. s., sed tiuj kombinaĵoj estas acoj kaj pro tio ili ne devas havi salan sufikson. Fine, ni atentu ke la vorto mem acido laŭ klasifiko estas nomo de salo (kp. azido) kaj nur pro tio ĝi ne devas esti uzata kiel nomo de acoj.

Akcepto de la vortoj aco, aca kaj la afikso ac en Esperantan kemian terminaron donos senduban avantaĝon al Esperanto kompare kun naciaj lingvoj. Dum kompilado de Esperantoversio al 10 mil-termina kvinlingva "Wörterbuch der Biochemie" mi konvinkigis en tio. Mi alvokas ĉiujn aŭtorojn de artikoloj uzi ac, aco, aca por same konvinkigi en racieco kaj logikeco de tiu uzado kaj por ke poste ni povu leĝigi tion en Akademio de Esperanto.



# La kultura vivo de kamparanoj de Chuxian

Fotoj de WANG ENPU

Dank' al praktikado de nova kampara labor-sistemo rapide disvolviĝis la agrikultura produktado en la subprovinco Chuxian, Anhui-provinco, kaj rimarkinde pliboniĝis la vivo de la tiea popolo. Nun tie funkcias 140 vilaĝaj kulturaj centroj. En iuj lokoj nove konstruiĝis teatroj, kinejoj, kulturaj domoj kaj organiziĝis filmo-projekciaj taĉmentoj, postlaboraj teatraj trupoj, instaligis bibliotekoj, sportejoj kaj aliaj amuzejoj. En postlaboraj horoj la kampuloj havas tie diversajn kulturajn aktivadojn, kiuj riĉigas ilian spiritan vivon.


La Lanterna Festo  
en Tianchang-gubernio



Rem-konkurso de kamparanoj en la Lanterna Feso







Geaktorj de Lai'an-gubernio ŝipveturos al kamparo kun rekvizitoj.



Ŝminkado antaŭ prezentado



Ĝui spektaklon

Postlabora opera trupo de Tianchang gubernio prezentas por kamparanoj.



Kampaninoj-aktorinoj





Foiro en Langya



Popola danco







En familio de iu riĉa kamparano

Ŝnur-tirado de kamparanoj



En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵojn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekomencas pro la kontribuadoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

MIA VIVO membiografio de Trifon Ĥristovski, tradukita de Nikola Aleksiev el la bulgara lingvo, eldonita de SOFIA PRES. Formato: 12 × 19 cm. 180 p. Prezo ne montrita.

Trifon Ĥristovski estas nek fama sciencisto aŭ politikisto, nek eminenta verkisto aŭ artisto, sed nur handicapulo-esperantisto, kies nomon mi neniam antaŭe aŭdis aŭ vidis, sed la nomita membiografio pri lia vivo de malpli ol 40 jaroj estas tiel interesa, ke mi tralegis ĝin preskaŭ sen halto. La aŭtoro estis filo de neriĉa kamparano, paralizigis pro poliomyelito, kiam li estis nur sesmonata bebo, restis sen elementlerneja instruiteco, suferadis de ostotuberkulozo kaj fistuloj sur la dorso kaj en la abdomeno, kaj tamen li multe legis, havigis al si bibliotekon, partoprenis sociajn aktivadojn, batalis kontraŭ faŝismo, verkadis por ĵurnaloj kaj gazetoj, aktive partoprenis la Esperanto-movadon per korespondado kun geesperantistoj en pli ol dek landoj kaj per skribado de artikoloj por diverslandaj Esperantaj periodaĵoj. Aparte interese por ni ĉinaj esperantistoj

## VIVO VERVA KAJ VERMUTA

estas, ke li eĉ pretigis manuskripton por broŝuro "La milito en Ekstrema Oriento" utiligante materialojn kolektitajn de li per Esperanto.

En nia mondo kredeble estas ne malmultaj handicapuloj mizere vivantaj kiel Trifon Ĥristovski, tamen la figuro de Trifon Ĥristovski brilas eksterordinare per sia kuraĝo kaj obstineco en batalo kontraŭ naturaj kaj sociaj malsanoj. Li donis imitindan ekzemplon ne nur por tiuj, kiuj devas luktadi kontraŭ malfaciloj kaj malfeliĉoj, sed ankaŭ por ĉiuj kiuj volas esti seriozaj kaj fari ion pozitivan dum sia mallonga vivo, en tiu ĉi homa kunekzistado. Por la esperantistoj li estas imitinda en la praktika uzado de la internacia helpa lingvo, ĉar li ne prenas ĝin kiel hobion, sed ĝin utiligas por la bono de la popolo. La verko estas leginda ankaŭ pro tio, ke ĝi vivece bildigis la kamparan vivon de Bulgario.

La lingvo de la traduko estas flua kaj facila kaj la preso estas sufiĉe klara. La malmultaj preseraroj, kiel ekz. *BARAĜO* sur p. 14 kaj *KOFEINON* sur p. 170, kiujn oni devas legi *BARAĴO* kaj *KAFEINON* respektive, neniom malhelpas la

legadon. Se paroli pri misuzo de vortoj, oni povus rimarkigi, ke anstataŭ *AŬSKULTIS* en la frazo *ĈIE ONI AŬSKULTIS NUR LA VORTON "PACO"* sur p. 41, oni devus uzi *AŬDIS*, anstataŭ *ESTINTE* en la frazo *MI, ESTINTE KVINJARULO, ESTIS JAM VETURINTA...* sur p. 45 oni devus uzi *ESTANTE* kaj anstataŭ *EMOCIIGIS* en la frazo *ONKLO RERAKONTIS AL MIAJ FAMILIANOJ LA DIRITAĴON DE LA BLINDULO KAJ EGE ILIN EMOCIIGIS* oni devus uzi *EMOCIIS*. Mi ankaŭ dubas pri la ĝusteco de la esprimo "Ili apenaŭ ne sorĉis vin per magia rigardo" sur p. 16. Eble tio estas bulgarismo? Kompreneble ankaŭ tiaj tuberetoj ne povas malhelpi glatan legadon. Mi rekomendas la interesan kaj maloftan membiografion al ĉiuj legemuloj kaj bibliotekoj.

Recenzis Laŭlum





# KIEL ESPERANTISTOJ POVUS VOJAĜI AL ĈINIO?

*Dum la lastaj jaroj, fremdlandaj esperantistoj ofte skribis al ni por demandi, ĉu Ĉinio akceptas esperantistojn-turistojn, kiamaniere ili povus viziti Ĉinion, k.a. Nun ni speciale petas s-anon Gong Peikang, kiu laboras en la Ĉina Vojaĝa kaj Turisma Administra Buroo, ke li klarigu iom pri tio.*

— La Red.

venintaj el kvin landoj, nome Britio, Francio, Nederlando, Danlando kaj Aŭstralio.

Ĉar en la mondo ankoraŭ ne estas Esperanta turisma servo, nek Esperanta organizaĵo, kiu havas specialan komercan rilaton kun nia LŬXINGSHE, iniciatanto aŭ organizanto de ĉiuj aĵoj esperantista turisma grupo sin turnu al sialanda turisma servo, kiu havas komercan rilaton kun nia LŬXINGSHE, por mendi vojaĝlinion al Ĉinio kaj aranĝi ĉion necesan por la vizitado; kaj ili ankaŭ povus prezenti apartan postulon pere de tiu al la ĉina. Krom tio, Ĉinio ankaŭ bonvenigas diverslandajn esperantistojn viziti Ĉinion individue aŭ kun sia familio.

## ĈIUJ ESPERANTISTOJ-TURISTOJ ESTAS BONVENAJ EN ĈINIO

En la lastaj jaroj, la ĉina turisma afero rapide disvolviĝis. En la jaro 1978 ni akceptis nur 229 000 fremdlandajn turistojn, sed en 1982 jam 764 500. De 1978 ni akceptis esperantistajn vojaĝgrupojn kaj turistojn venintajn el Japanio, Usono, Eŭropo, Aŭstralio k.a. Je la komenco de 1982, la Internacia Vojaĝa Servo de Ĉinio (LŬXINGSHE, aŭ angle, CITS) jam petis la Ĉinan Esperanto-Ligon transdoni al la Universala Esperanto-Asociacio deziron, ke diverslandaj esperantistoj vojaĝu en Ĉinio kaj okazu internaciaj Esperantaj kunvenoj en ĝi.

## ĈU ĈINIO POVUS FACILIGI AL ESPERANTISTOJ-TURISTOJ LA ESPERANTAN AKTIVADON?

Dum la lastaj jaroj, la ĉina registaro donis apartan zorgon al la Esperanta movado. En multaj lokoj de Ĉinio, precipe en plejparto de la ĉefaj turismaj urboj, stariĝis Esperantaj asocioj aŭ grupoj, tio estas nemankigebla kondiĉo por Esperanta aktivado de la esperantistoj-turistoj dum ilia vojaĝo en Ĉinio. La

esperantistoj-turistoj en Ĉinio povas havi Esperantan gvidiston por la tuta vojaĝo, senditan de LŬXINGSHE, tial ili, kiel ordinarnaj turistoj, povus ĝui bonan akceptadon kaj, kiel esperantistoj, povus kontaktiĝi kun ĉinaj samideanoj, interŝanĝi spertojn kaj starigi amikecon kun ili kaj koni la nunan staton de la ĉina Esperanta movado.

## KIAJN FORMOJN ESPERANTISTOJ-TURISTOJ POVUS PRENI POR VIZITI ĈINION?

Estas ĝenerale du formoj: A) organizi esperantistan turisman grupon; B) partopreni ordinaran turisman grupon. Laŭ mi, la unua formo estas pli bona, ĉar tia grupo havas esperantan gvidiston, kiu multe helpas al la esperantistoj-turistoj en ilia Esperanta aktivado. Kaj nun la esperantista turisma grupo ankaŭ havas du formojn: A) ĝi konsistas el samlandaj esperantistoj, ekz., tiu gvidata de la japana esperantisto s-ro Tokuda Rokuro en 1978 kaj 1980, kaj tiu gvidata de s-ino Isobe Jukiko, prezidantino de JEI, en 1980, iliaj grupoj ĉiuj estas japanoj; B) ĝi konsistas el kelklandaj esperantistoj, ekz., tiu gvidata de la brita esperantistino s-ino Nancie Durham en 1982, ŝiaj grupoj estis

## KIAJN SERVOJN LA ĈINA LŬXINGSHE DONAS, KAJ KIOM ILI KOSTAS?

LŬXINGSHE praktikas pakvojaĝon kaj la pago inkluzivas tiujn por la inkluziva servo, veturo inter urboj laŭ la vojaĝa linio, veturo superdistanca (40 km. for de la urba centro), plezurveturo per boato sur rivero aŭ lago kaj aliaj servoj kiujn la vojaĝa grupo petis doni anticipe, ekz., ĝui lokajn pladojn, superklasan ĉambron k.a.

La inkluziva servo havas jenajn enhavojn: 1) hotelo laŭ klasoj; 2) tri manĝoj tage, inkluzive de trinkaĵoj (ne alkoholaĵoj) tagmeze kaj vespere; 3) veturilo kun aerokondiĉo laŭ la

planitaj programoj; 4) gvidisto-interpretisto (tiu por la tuta vojaĝo estas havebla por la grupo kun 6 personoj minimume); 5) veturo de aerodromo, fervoja stacio aŭ haveno al hotelo; 6) servo de valizo; 7) eniraj biletoj por ekskurso kaj teatraĵoj.

De 1983, la prezo de la inkluziva servo konsistas el kvin klasoj: por 10- kaj pli-ol-10-membra grupo ĉiu persono devas pagi ĉiutage: 1) por Pekino, RMB 87 juanojn (RMB 1 juano preskaŭ egalas al  $\frac{1}{2}$  usona dolaro nun), 2) por Guilin kaj Xi-an 84 juanojn, 3) por Ŝanhajo, Suzhou, Hangzhou, Kantono, Gansu kaj Xinjiang, 80 juanojn, 4) por Nankino, Wuxi, Tianjin, Fuzhou, 78 juanojn, 5) por ceteraj urboj, 75 juanojn; por 2-9-membra grupo ĉiu persono devas pagi ĉiutage: 1) RMB 106 juanojn, 2) 103 juanojn, 3) 101 juanojn, 4) 99 juanojn, 5) 95 juanojn; por persona vojaĝo ĉiutage oni devas pagi: 1) RMB 168 juanojn, 2) 163 juanojn, 3) 161 juanojn, 4) 157 juanojn, 5) 152 juanojn. Infanoj, sub gvido de siaj gepatroj: 2-5-jara pagas 30-procente; 6-11-jara, 50-procente; kaj 12- kaj pli-ol-12-jara, 100-procente.

### **KIAN SENPAGAN FAVORON LÜXINGSHE PRAKTIKAS?**

1) Por 15- kaj pli-ol-15-persona vojaĝa grupo (ekskluzive de la al-tibeta grupo, grupo de ekonomia klaso kaj infanoj) la grupestro ĝuas senpagan vojaĝon, t.e., unu persono el ĉiu 15-persona grupo ĝuas senpagon de la inkluziva servo kaj tiun de superdistanca veturado, boato-ekskurso, vizito al la Granda Muro k.a.; du personoj el ĉiu 30-persona grupo ĝuas tian senpagon, kaj tian senpagon ĝuas

maksimume 10 personoj el la grupo kun 150 aŭ pli da personoj.

2) En la neokupata turisma sezono de la unua de decembro ĝis la 31-a de la sekvan-ta marto ĉiujare, la vojaĝa grupo al Ĉinio (minimume el 15 personoj, ekskluzive de grupo de ekonomia klaso kaj infanoj) ĝuas la favoron de malaltigo de la prezo de la inkluziva servo je 20 procentoj ĝenerale.

### **ĈU TURISTOJ AL ĈINIO POVUS PORTI KINO-APARATON KAJ VIDEOKAMERON?**

Ĝenerale oni povas porti 8-mm-an aŭ mini-8-mm-an kino-aparaton kaj 1/2-colan videokameron. Tiu, kiu volas porti 16-mm-an kaj pli-ol-16-mm-an kino-aparaton kaj 3/4-colan aŭ pli-ol-3/4-colan video-kameron, devas peti specialan permeson de la koncerna fako. Estas malpermesite uzi la filmon kaj videon por komerca celo.

### **KIUJ EL LA ĈINAJ URBOJ ESTAS PLI TAŬGAJ POR ESPERANTISTOJ?**

Nun Ĉinio malfermas al fremdlandaj turistoj 135 urbojn kaj regionojn, inter kiuj la jenaj havas pli viglan Esperantan aktivadon: Pekino, Tianjin, Ŝanhajo, Taiyuan, Huhhot, Ŝenyang, Changchun, Harbin, Nankino, Suzhou, Wuxi, Yangzhou, Zhenjiang, Hangzhou, Fuzhou, Xiamen, Nanchang, Jinan, Zhengzhou, Wuhan, Changsha, Kantono, Nanning, Guilin, Chengdu, Chongqing, Kunming, Xi-an, Lanzhou. Tiuj urboj estas pli idealaj por esperantistoj-turistoj kaj ili povus elekti parton de ili.

### **KAJ ALIAJ PROBLEMOJ KLARIGENDAJ:**

1) Ĉar la esperantistaj turismaj grupoj al Ĉinio estas ne tiel multaj, organizantoj de la grupo bonvolu noti "ESPERANTON" al sia grup-numero dum la mendo de la vojaĝlinio al Ĉinio.

2) La esperantista turisma grupo havos Esperantan gvidiston por la tuta vojaĝo, tamen lokan Esperantan gvidiston ne en ĉiu loko, ĉar ni ĵus komencis la esperantan turismon. Komprenoble, ĉiulokaj Esperantaj organizaĵoj donos al ni necesajn helpojn.

3) Dum la lastaj jaroj, diverslandaj esperantistoj ofte skribis al mi, ke ili volas viziti Ĉinion. Nu, se iuj volas viziti nian landon ĉi-jare, bonvolu: a) mem organizi esperantistan turisman grupon kaj turniĝi al unu el sia-landaj turismaj servoj, kiuj havas komercan rilaton kun nia LÜXINGSHE por mendi vojaĝlinion al Ĉinio; b) partopreni la internacian esperantistan turisman grupon al Ĉinio dum la tempo de la 22-a de aŭgusto ĝis la 10-a de septembro, kiun organizos brita esperantistino sino Nancie Durham, (ŝia adreso: 80 Morley Road, Chadwell Heath, Romford, Essex RM6 6XA, Britio); c) kontaktiĝi kun la Changsha-a Branĉo de LÜXINGSHE. Nun mi speciale atentigas japanajn esperantistojn, ke la Changsha-a Branĉo planas malfermi la specialan esperantistan vojaĝlinion nomatan "Laŭ la Spuroj de Verda Majo". Mi esperas, ke tiuj, kiuj interesiĝas pri tio, tuj rilatiĝu kun la Branĉo. (La adreso: S-ro Yang Kaiyuan, Changsha-a Branĉo de la Ĉina Internacia Vajaĝa Servo, 130 Shangxing St., Changsha, Hunan, Ĉinio).



## NOVAJ ESPERANTAJ LERNILOJ EN ĈINIO

Por kontentigi la bezonon de ĉiam pli multiĝantaj komencantoj la Pekina Esperanto-Asocio kompilis la Ĉina-Esperantan Vortaron kun pli ol 14 000 vortoj kaj vortogrupoj, kiun eldonis la Eldonejo "Scioj" en januaro 1983. Oni jam distribuis 25 000 ekzemplerojn.

Wei Yuanshu, vicestro de la Fremdlingva Instituto de Ŝanhajo, kaj esperantistino Xu Wenqi kompilis "Gramatikon de Esperanto", kiun eldonis la Ŝanhaja Eldonejo por Fremdlingva Instruado. Ĝi estas la unua kompleta gramatiko de Esperanto eldonita post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Ankaŭ Yu Guojian kaj aliaj du kunlaborantoj kompilis la Ĉina-Esperantan Vortaron, kiun eldonis la Anhui-a Universitato.

## ESP-ASOCIO DE HUNAN OKAZIGIS SIAN LABOR- KUNVENON

De la 12-a ĝis la 14-a de marto, la Hunan-a Esperanto-Asocio okazigis en la urbo Changsha laborkunvenon, kiun ĉeestis reprezentantoj de la instruaj sekcioj de fremdaj lingvoj de la Medicina Instituto, Instruista Instituto, Agronomia Instituto, Ĉin-

medicina Instituto kaj Xiangtan-universitato de Hunan. La kunveno diskutis pri instruado de Esperanto kiel nedeviga lernoobjekto en altlernejoj kaj funkciigo de Esperantaj kursoj en diversaj lokoj de la provinco. En la kunveno oni ankaŭ demonstris Esperantan lecionon kaj diskutis pri metodoj de la Esperanta instruado. La kunveno decidis starigi instruan komisionon por altigi la lingvan nivelon kaj instruan lertecon de la kursgvidantoj.

## ESPERANTISTA ĤORO KAJ ESPERANTISTA-FILATELISTA GRUPO EN LANZHOU

Por propagandi kaj disvastigi Esperanton kaj por ke pli multaj literaturaj kaj artaj laborantoj fariĝu esperantistoj, la Lanzhou-a Esperanto-Asocio starigis, en la lasta februaro, la Lanzhou-an Esperantistan Ĥoron, kiu invitis Gao Jinrong, prezidanton de la Gansu-a Dancista Asocio, kiel sian konsilanton. En marto ĝi starigis en la urbo ankaŭ la Esperantistan-Filatelistan Grupon.

## EKSPOZICIO DE ESPERANTAJ ELDONAĴOJ EN LA FINANCA KAJ EKONOMIKA INSTITUTO DE SICHUAN

Marte la biblioteko de la nomita instituto okazigis ekspozicion de ĉin-kaj fremdlingvaj referencaj libroj. En ĝi estis stando por montri pli ol 200 ekzemplerojn da Esperantaj

eldonaĵoj, ekzemple verkoj de Zamenhof, Esperantaj vortaroj kaj Esperantaj libroj kaj gazetoj de Ĉinio kaj aliaj landoj. La ekspozicion vizitis kelkcent personoj.

## ANNA KISS SOPRANIS EN ĈINIO

En marto, hungara esperantistino-sopranulino s-ino Anna Kiss vizitis Ĉinion por fari turneon al Pekino kaj aliaj urboj. Vespere de la 13-a de marto, geesperantistoj laborantaj en la Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de El Popola Ĉinio kaj la Esperanta Sekcio de Radio Pekino vizitis ŝin en la Hotelo Yanjing, havis agrablan interparolon kun ŝi, ĝuis ŝiajn belajn kantojn en Esperanto kaj la ĉina lingvo kaj interŝanĝis kun ŝi memoraĵojn. Ŝi kaj ŝia kunulino-pianistino donis koncerton en la teatro de la Nacia Kultura Palaco vespere de la 24-a kaj 25-a de marto. Ŝia bela voĉo kaj lerta kantado tiel plaĉis al la aŭskultantoj, ke ŝi rikoltis multajn aplaŭdojn.

**EL IRANO:** Por kontentigi la bezonon de organizitaj Esp. asocioj, iranaj geesp-istoj fondis Iran-Esperanton (IE) antaŭ ĉirkaŭ du jaroj. Celante pli regule trakti la aferojn, oni organizis ankaŭ diversajn labor-grupojn (LG). Komuna kunsido de LG-anoj ĝenerale okazas ĉiudusemajne. Raportenda diskuto okazinta lastatempe temas pri jeno:

1. La forta bezono pri scienc-teknikaj verkoj ĉe la tria-mondanoj igas ilin unuavice serĉi kaj lerni la plej facilan lingvon — Esperanton. Tion konfirmas ankaŭ multaj gravaj reagoj tiuterene, i.a. fondiĝo de Scienc-eldona Centro en Budapeŝto kaj seriozaj aktivadoj de diversaj grupoj kaj sindediĉaj individuoj por riĉigi sciencan literaturon de E-o; 2. E-o kun ĉia sia facileco ne estas tiel facile ellernebla por orientanoj kaj afrikanoj, kiel por okcidentanoj. Sekve ankaŭ instru-metodo rilate la kvanton da vort-provizo devas esti malsama ĉe latinidlingvanoj ol ĉe alilingvanoj. Ankaŭ la gazetaro ne povus esti escepto tiurilate. Alme-

*La Kvina Jara Kongreso de Pakistana Esperanto-Asocio*



naŭ por la komencantoj en la tria mondo necesas ekzisti facilaj revuoj, en kiuj estus tre limigita vortprovizo. Plej ofte oni post la fino de la elementa kurso ne trovas sin kapabla ĝui eĉ unu el la ekzistantaj Esp. gazetoj. Tial multaj forlasis E-on pensante, ke ankaŭ E-o estas malfacila kaj ili trompiĝis; 3. Estas rekomendinde al Heroldo de Esperanto kaj aliaj E-aj periodaĵoj pli konscie kaj pli multe aperigi pri-junulajn fotojn kaj temojn. Alie, la junaj lernantoj vidos plie E-on kiel emeritan hobion kaj aferon.

**EL PAKISTANO:** Pakistana Studenta Esperanto-Ligo (PASELO) estis fondita en la 25-a de decembro 1982. Ĝiaj celoj estas: 1. disvastigi Esperanton kaj internaciajn informojn per E-o; 2. lerni kaj instrui Esperanton; 3. fari universalan kaj landan amikecon per korespondado; 4. gastigi internaciajn kaj landajn geesperantistojn.

Ĝi petas viajn opiniojn kaj helpon por sukcesi en siaj celoj. Skribu al: s-ano Amĝad Bat Esperanto, 732/c Mari (Murree), Pakistan.

**EL JUGOSLAVIO:** En elementa lernejo "Prvi maj" en Sarajevo, Jugoslavio, 300 gelernantoj lernas Esperanton. Organizanto kaj instruanto estas Smail Grbo, prezidanto de la sekcio de esperantisto-instruistoj por Bosnio kaj Hercegovino kaj aŭtoro de la libro "Esperanto en Lernejoj" en nacilingvo. Esperanto-klubo, OS "PRVI MAJ", Aplipasino polje, 71000 SARAJEVO, Jugoslavio.

**EL RUMANIO:** En la 30-a de jan. 1983 komenciĝis la 3-a eldono de la perkoresponda DELTANA ŝakturniro organizita de Esperanto-ŝakklubo DELTANA el Sulina, Rumanio. La turniro estis en 27 grupoj po 7 ludantoj entute 189 ludantoj el 13 landoj. La 4-a eldono por viroj komenciĝos en la 1-a de jan. 1984. La 1-an de apr. 1983 startis la perkoresponda ŝakturniro por virinoj.

Oficiala lingvo de la turniroj estas Esperanto, kaj ĝia celo estas plifor-



*S-ino Luise Daum, s-ro Dai Song-en kaj d-ro J. Kondor*

tigi la amikecon inter homoj el diversaj landoj.

**EL JAPANIO:** La 70-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazos du tagojn de la 6-a ĝis la 7-a de aŭg. 1983, en la urbo Kameoka, sub la organizado de la Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA). Samtempe EPA celebros la 60-jaran datrevenon de la enkonduko de Esperanto en Oomoto-movadon en 1923, sekvantan tagon de la Kongreso. La partopreno de multaj eksterjapanaj esperantistoj estas kore atendata de la organizantoj. Partoprenantoj sin anoncu al la Oomoto-Centro, Kameoka-si, Kioto-hu, 621 Japanio.

**EL ITALIO:** Kunlabore kun Internacia Esperanto-Kursejo en Pisani-ca, Bulgario, Komisiono pri Virina Agado anoncas kurson por virinoj pri publika parolado. La kurso okazos unu semajnon antaŭ la UK en Budapeŝto, tiel ke partoprenantoj povos laŭdezire poste vojaĝi al la UK. Pliaj detaloj haveblaj de Internacia Esperanto-Kursejo, p.k. 791, BG-1000 Sofia, Bulgario.

**EL NEDERLANDO:** La Nederlanda Esperanto-kongreso okazis la 27-an de feb. 1983 en Driebergen. Ĝin partoprenis 150 personoj, inter kiuj estis ankaŭ kelkaj eksterlandaj gesamideanoj. Pro la Monda Jaro de

Komunikado ĝi estis dediĉita al diversaj aspektoj de komunikadaj problemoj.

**EL BRITIO:** Post sia vizito al Ĉinio kun grupo de kvinlandaj esperantistoj en la pasinta jaro, brita esperantistino Nancie Durham ankoraŭfoje organizos vizitgrupon al Ĉinio de la 21-a de aŭg. ĝis la 10-a de sept. ĉijare. Ili planis viziti la urbojn Pekino, Tianjin, Nankino, Wuhan, Suzhou kaj Ŝanhajo, kaj ankaŭ la famajn Grandan Muron, Ming-tombojn, palacojn en Pekino kaj aliajn vidindaĵojn, fabrikojn kaj komunumojn laŭ plaĉo de la grupanoj. Por detaloj sendu respondkuponon al Nancie Durham, 80 Morley Road, Romford, RM6 6XA, Britio.

**EL FR GERMANIO:** inter la 1-5 de jan. 1983, germana esperantisto dr. J. Kondor amike gastigis en sia hejmo ĉinan s-anon Dai Song-en, laboranton de Ĉina Esp-Ligo, kiu nun portempe laboras en UEA-centro, Roterdamo, Nederlando por spertiĝi ĉefe pri organiza laboro de UK. Dr. J. Kondor (de dekstre) estas malnova entuziasma leganto de El Popola Ĉinio kaj aŭskultanto de Radio Pekino. Li tre ofte skribis leterojn al la redakcio de EPC montrante sian sinceran amikecon kaj subtenon kaj samtempe sendis multajn materialojn pri siaj Esp. aktivecoj kaj porleprula agado.

## Privataj lernejoj en Pekino

**E**N la lastaj jaroj diversaj privataj lernejoj denove viglis en Pekino.

La eduka afero de la nova Ĉinio estas entreprenata ĉefe de la ŝtato. Tamen la nunaj ŝtataj lernejoj kun ĝiaj ekipaĵoj ne povas kontentigi la bezonon de la socialisma konstruado. Tial Ĉinio nun plenenergie disvolvas ŝtatajn lernejojn kaj ankaŭ kuraĝigas sociajn organizojn kaj privatulojn fondi lernejojn, por ke pli multaj homoj povu esti klerigitaj.

En la dek-jara haoso de 1966 ĝis 1976, ĉiuj privataj lernejoj en Ĉinio estis nuligitaj. En 1980, tri personoj en Pekino prezentis al la urba registaro sian propo-

non starigi privatan lernejon kaj ricevis la sankcion. Pekino nun havas pli ol 50 privatajn lernejojn. La kursoj lekciataj por lernantoj kun malsamaj klerecoj konsistas el tiuj de rudimentaj scioj, fremda lingvo, muziko, pentrarto, fotografio, kaligrafio, tajlado, kudrado, maŝinbrodado, tajpado ĉin- kaj fremdlingva k.a.

Printempe de 1981, kiam ekfunkciis la Kontista Lernejo Changzheng, ĝi prenis ordinaran loĝĉambron kun areo de nur ok kvadrataj metroj kiel sian oficejon kaj havis nur 135 lernantojn. Post duonjaro ĝi intencis varbi pliajn 100 lernantojn. Estis neatendite ke pli ol 500 personoj

sin anoncis. En la lasta aŭtuno la anoncantoj superis 900. Nun ili luprenis klasĉambrojn de iu elementa lernejo por irigi la instruadon.

Pri la rapida disvolviĝo de la lernejo, ĝia iniciatinto Yang Qihua diris: "En 1980, la financaj kaj ekonomiaj kolegioj de nia lando havis nur pli ol 20 000 lernantojn. Ili ĉiujare povas elkulturi al la ŝtato nur 4 000-5 000 fakulojn. Ĉinio havas 380 000 industriajn kaj trafikajn entreprenojn, se la ŝtato donus al ĉiu entrepreno po unu diplomiton de tia kolegio, tio do povus plenumiĝi post pli ol 70 jaroj. El tio videblas kiom malmulta estas la nombro de la lernantoj de financaj kaj kontistaj fakoj!"



Provo (Lignogravuraĵo)

de CHEN XIAO



Kompreneble, ĉu la privataj lernejoj povas ekzisti aŭ ne, tio dependas de ĝia instrua kvalito. Ekzemple, la Tajlora Lernejo Heping garantias ke ĉiuj lernantoj povos fari vestojn laŭ 40 fasonoj post tri-monata lernado de 156 lecionoj. Tiuj, kiuj ne atingas la normojn post la lernado, povas daŭre lerni senpage. La lernejo en la pasintaj du jaroj elkulturis pli ol 4 000 tajlorojn, nun en ĝi lernas pli ol 800 lernantoj.

Ĝis nun tiuj privataj lernejoj sen ŝtata investo jam elkulturis pli ol 14 000 diplomitojn, kaj nun en ili lernas pli ol 10 000 lernantoj.

La iniciatintoj de privataj lernejoj plejparte estas emeritoj kaj senokupaj intelektuloj kun fakaj scioj. La emeritoj vivtenas sin per pensio donita de la ŝtato. Tial ili funkciigas lernejon nek por vivteni sin nek por riĉiĝi. Emerita profesoro Wu Mingyue faras instruadon en sia hejmo, postulante neniom da pago. La 70-jara Yang Qihua organizas kaj administras la privatan lernejon kun 1 200 lernantoj kaj ĉiumonate li ricevas rekompencon de nur 30 juanoj.

Iuj personoj sen fiksa profesio starigas lernejojn por sin vivteni. Wu Huinan estas fondinto de privata tajlora lernejo. En 1953 li ĉesigis sian lernadon en la Wuhan-a Medicina Instituto pro malsano kaj venis al Pekino. Li funkciigis privatan lernejon intermite pli ol dek jarojn. Poste, lia privata lernejo estis nuligita kaj li vivis de taglaboroj. Post kiam li restarigis privatan lernejon, li ĉiumonate enspezas 200-300 juanojn, duoble pli multe ol ordinara laboristo. Laŭ la koncerna difino de la ŝtato, la re-

kompenco por unu-hora instruado estas du juanoj. Li ĉiutage donas ĉ. 5-horan lecionon kaj ĉiusemajne lecionojn de pli ol 30 horoj. Nature, lia laborkvanto estas duoblo de tiu de mezlerneja instruisto. Pro tio lia enspezo estas konvena.


Estas alia okazo, ke iuj starigas privatan lernejon por gajni profiton. Por forigi tian fenomenon, la urba registaro de Pekino faris difinon: "La privata funkciiganto de lernejo devas observi la ŝtatan leĝon, serioze praktiki la edukajn principojn kaj politikojn de la Partio kaj garantii instruan kvaliton." Por atingi la celon, la fondinto de privata lernejo devas prezenti sian peton al koncerna eduka instanco, klarigi la celon de la lernejo kaj akcepti konvenajn ekzamenon kaj kontrolon. Se oni ne plenumas la proceson aŭ ne povas garantii instruan kvaliton, la registaro rajtas ordone ĉesigi funkciadon de la lernejo.

La enspezo de privata lernejo venas ĉefe el la lernopago donita de la lernantoj. Nun ĉiu lernanto ĝenerale pagas ĉ. 0.1 juanon por unu-hora leciono. Ekzemple, la lernopago por la duonjara lernado en la Kontista Lernejo Changzheng estas 20 juanoj. Post dekalkulo de salajro de la instruistoj, lupago por klasĉambroj kaj elspezo por aĉeti instruajn instrumentojn, la resta plejparto estas deponita en banko kiel kolektiva fonduso, kiu neniu devas disponi laŭplaĉe.

La ĉina registaro kuraĝigas la sociajn fortojn funkciigi diversajn profesiajn lernejojn helpe al la ŝtata eduka afero, tial la privata funkciigado de lernejo ankoraŭ havos kompare grandan disvolviĝon.

(Daŭrigo de p. 26)

kovras nigraj nuboj. En montvaloj de tiu regiono je 4 000 metroj alta super la marnivelo, eĉ kreskas diversaj herboj kaj vivas multaj altebenajaj bestoj, kiel marmoto, neĝa koko, grandkapa kapro. Tie plej multe kreskas legumenacoj kun malgrandaj floroj, kiuj dense kovras montdekklivojn kvazaŭ sternitaj tapiŝoj. Mi sukcesis foti sur neĝkovrita loko 5 000 metrojn alta super la marnivelo planton, forme similan al spinaco. Laŭdire ĝi efikas por kuraci hipertension kaj altmontan reakcion. En sia mallonga vivo ĝi timas nek frostan venton nek neĝon. Oni ankaŭ ofte trovas tie neĝlotuson (*Saussurea involucreta*). Tamen en Pamiro mankas arboj, nur en vilaĝoj situantaj je malpli ol 3 000 metroj super la marnivelo troveblas poploj kun dikeco de homa brako. La montoj kuŝantaj je 3 000-4 000 metroj super la marnivelo havas en si abundajn mineralojn. Kutime oni nomas monton per la nomo de mineralo, kiun ĝi havas en si. Oni diras, ke la loko riĉas je kristalo, kaj ke antaŭ tre longe la lokaj loĝantoj eĉ masonis kortan muron per kristalo.



# PAMIRO — FIRSTO DE LA MONDO

de LAO BAI

**P**AMIRO, fame konata kiel firsto de la mondo, sin trovas parte en la okcidenta parto de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. Ĉiuj, kiuj surgrimpis la “firston”, estis senescepte ravitaj de ĝiaj eksterordinare belaj pejzaĝoj kaj mirigitaj de ĝia kaprica klimato.

Jam antaŭ 1 300 jaroj la fama ĉina bonzo de Tang-dinastio Xuanzang trairis Pamiron dumvoje al Hindio por akiri budhis-majn sutrojn. Li priskribis la lokon: “Printempe kaj somere tie kovriĝas neĝo kaj forte blovas frosta vento. Kreskas nek grenplantoj nek arboj krom herbetoj. Eĉ en varma sezono multas neĝo kaj vento.” Julie de la lasta jaro, kiam mi vizitis la lokon por kolekti informojn pri la tieaj nacimalplimulto, mi profunde sentis, ke lia priskribo estas fidela pri la loko.

Pamiro estas nodo de la montoj Himalajo, Kunlun, Tianshan kaj Hindukushi. La altebenaĵo, kvankam eroziita dum milionoj da jaroj, ankoraŭ konservas sian originan fizionomion. Antikve oni nomis ĝin Congling, kiun trapasis la “Silka Vojo” kondukanta al la Okcidenta Azio. Delonge mi jam aŭdis pri la vojaĝa malfacileco kaj aera maldenseco en tiu regiono, tamen pelate de scivolemo, mi ekveturis de Kashi, la

plej granda urbo de okcidenta Xinjiang, al Pamiro.

Post kvin-hora veturado laŭ la “Silka Vojo” nia aŭto eniris en la montregionon. Kaj antaŭ ni tuj prezentiĝis neĝkovritaj montpintoj. Post plua du-hora vojaĝo, nia aŭto jam balanciĝis en profundaj valoj, garnitaj ambaŭflanke de abrupte leviĝantaj kuriozaj krutaĵoj. Kiam la aŭto surgrimpis sur Subashidaban-deklivon, forta montvento frostigis nin ĝisoste. Ĉe la ekveturo ni estis maldike vestitaj, kaj nun ni devis tuj surmeti lanajn vestojn. Frapis niajn okulojn tute alia bildo: super ni ŝtonegoj amasiĝis unuj sur aliaj kvazaŭ tuj deruliĝonte, malsupre estas abismo profundega kaj malproksime majeste staras neĝkovrita pinto Muztagata, patro de glaciaj montoj. Sed ĝi ankoraŭ ne povas esti kalkulata kiel la plej alta. En Pamiro la montpintoj Konguro kaj Kongurtiubie, ĉiu kun alteco de pli ol 7 500 metroj, estas pli altaj ol ĝi. Antaŭ 30 jaroj fremdlandaj ekspediciantoj kvinfoje grimpis Muztagata, sed neniam atingis la montsupron. Julie de 1959 ĉinaj gegrimpistoj sukcese atingis la montsupron, kaj per tio kreigis la rekordo de la monda virina kolektiva montgrimpado.

Pamiro abundas je glaciriveroj. Kiam gigantaj glacimasoj

moviĝas malsupren laŭ deklivo ĝis rando de valo, okazas tie lavango. Kongur-montaro estas abunda je lavangoj. Dum okazo de lavango miloj kaj dekmiloj da tunoj da neĝo forpuŝiĝas de sur montdeklivo. Ja mirinda spektaklo. Sub la arda suno degelas la glacio kaj neĝo sur la montoj, kies akvo torentas malsupren kaj akvumas oazojn en vasta dezerto.

Sur la norda deklivo de Subashidaban kuŝas lago Kalaguli 30 metrojn profunda kun areo de unu kvadrata kilometro. En sunradioj montriĝas sur la akvo diverskoloraj lumringoj, kvazaŭ flirtantaj silkrubandoj en zefiro. Legendo diras, ke la lago formiĝis el bankuvo da akvo versita de la Diino Xiwangmu, kaj la brilantaj rubandoj estis ŝiaj oraj haroj. La lokanoj nomas ĝin Har-lava Baseno de la Diino Xiwangmu. Somere taĝikaj virinoj ofte venas tien por lavi siajn harojn, ĉar ili opinias, ke la akvo povas fari iliajn harojn brile nigraj kaj bonodoraj.

La kvar sezonoj en la regiono estas malfacile distingeblaj. Somere povas fali neĝo, dum vintre la malseka loko sin vestas verde; matene la suno brilas, sed posttagmeze la ĉielon jam

(Daŭrigota sur p. 25)



# Pejzaĝoj de Pamiro

Fotoj de LAO BAI kaj HAI FENG

(Pri detaloj bonvolu legi la artikolon "Pamiro — firsto de la mondo" en tiu ĉi numero.)



Paŝtado en la altebenajo


En Pamiro









Planto sur la altebenajo





La lago Kalaguli en la montaro






Tordita Turpinto de Francio  
de P. LEON GOUDE (Francio)



# ***Gajninto de 5 Oraj Medaloj***



*Li Chenggang*

**E**N novembro de la lasta jaro, la Ĉina Sporta Delegacio de Gehandikapuloj konsistanta el 15 membroj partoprenis la Trian Handikapulan Sportkunvenon de la Ekstrem-orienta kaj Sud-pacifika Regionoj, okazigitan en Hongkong. Tie la sportistoj de Ĉinio faris konkursojn pri atletiko, naĝo kaj tablotenis. Unu el ili akiris ĉampionecojn de 5 disciplinoj, nome de la 50-metra brustonaĝo, 50-metra dorsonaĝo, 100-metra rapidnaĝo, longosalto kaj tablotenis, kaj gajnis 5 orajn medalojn kaj 1 arĝentan medalon.

Li estas 24-jara handikapulo Li Chenggang, kiu havas nur unu brakon kaj unu gambon. Kiam li estis 1.5-jara, li ludis kun sia pliaĝa fratino ĉe fervojo kaj malfeliĉe perdis dekstrajn brakon kaj gambon en la akcidento. Tiam la patrino donis al li tabureton anstataŭ meti lin en la lulilo. En la komenco li sin ŝovadis antaŭen sidante sur la tabureto kaj poste sin ekzercis en irado per la nura gambo. Li estis moviĝema. Vidante, ke infanoj

ludas piedpilkon, li do partoprenis en la ludado. Kvankam li estis ofte faligita de aliaj kaj vundita pro interpuŝado, tamen li turnis nenian atenton al tio. Poste, la patro faris al li lambastonon, tial estis pli oportune por li fari sportadon.

En la elementa lernejo, la instruisto permesis al li ne plenumi la sportan lernoobjekton, tamen li petis la permeson de la instruisto partopreni en la sporto. Tial li ellernis fari alto- kaj longosaltadon kaj ludi pied- kaj korbopilkon. Malgraŭ la kripleco, somere li naĝis en proksima rivero kune kun siaj kunlernantoj kaj povis naĝi 5 000 — 6 000 metrojn.

Post la diplomitiĝo en la supera mezlernejo, Li Chenggang eklaboris kiel staplisto de la Tianjin-a Socibonstatiga Kudrejo en la Norda Antaŭurbo. Tiam li daŭre persistis en kurekzercado. Ĉiutage li kuris pli ol 1 000 metrojn. Fakte li saltis antaŭen per la sola gambo!

Lia obstineco kaj persistemo profunde kortuŝis aliajn. La

sporta instruisto de lia antaŭa lernejo donacis al li taŭgan ŝuon, kio ebligis al li salti pli longe je 30-40 centimetroj ol antaŭe. Kaj lia bona amikino ofte akompanis lin en la ekzercado. Ŝi estis knabino nomata Hao Chunli, kiu konatiĝis kun li en la kudrejo. En la infanaĝo grava malsano lamigis ŝin. Pro la komuna malfeliĉo ili kompatis unu la alian kaj post nelonge la amo kunligis ilin. Ŝi multe helpis lin en la fizika ekzercado, kaj ili ofte kune ludis volanon. La diligenta ekzercado havigis al li specialajn ludmanierojn kaj li ofte venkis nekriplajn rivalojn. Foje en longosalta konkurso li sukcesis salti 3.19 metrojn kaj per tio atingis la mondan nivelon de handikapuloj-sportistoj.

En la handikapula sportkunveno, laŭ sia kripleco li devis partopreni en la A 9-klasa grupo de la tablotenisa konkurso, sed en la konkurso de tiu ĉi klaso partoprenis li sola. Por ne perdi la ŝancon, li petis partopreni en la konkursoj de la A 6-klasa grupo kaj la A 8-klasa grupo, en


# SENMEDIKAMENTAJ TERAPIOJ DE LA ĈINA MEDICINO

de HUO RUIXING

**L**A ĉina medicino havas multajn terapiojn. Ĉi tie mi traktas senmedikamentajn terapiojn akupunkturajn, kaŭterizan, kupan, kiropraktikan, skrapan kaj masaĝan.

La akupunktura terapio estas plej ofte uzata. Ĉar ĝi povas kuraci multajn malsanojn, efikas rapide kaj estas facile aplikebla, multaj landoj lernas kaj prakti-

*Akupunktura terapio*



kiuj du grupoj devis partopreni la kriplulojn sen antaŭbrako aŭ mano. Kvankam li sciis, ke estos tre malfacile por li akiri ĉampionecojn, tamen li decidis tuforte klopodi.


Lia unua rivalo estis indonezia tablotenisisto. En la komenco la indoneziano batis kelkajn rapidajn kaj longdistancajn pilkojn, kaj al tio li sin ne adaptis pro konfuziĝo, sed tuj poste li jam alkutimiĝis. Li drajvis la pilkon foje-refoje, egaligis la poentojn kaj fine venkis la rivalon per 2:0. En la tablotenisa konkurso li saltis tien kaj tien per la sola

kas ĝin. Ĉinio funkciigis internaciajn akupunkturajn kursojn en Pekino, Ŝanhajo kaj Nankino por kulturaj akupunkturistoj por aliaj landoj. Ekde 1975, la internacia akupunktura kurso en Pekino elkulturis 230 akupunkturistojn por 66 landoj kaj regionoj.

Ĉe la akupunktura terapio oni enpikas longajn maldikajn arĝentajn pinglojn en certajn korpopunktojn de paciento kaj rikoltas bonan efikon per pingla ekscito. Ĉiu homo havas 361 korpopunktojn. Oni pingle enpikas malsamajn korpopunktojn por kuraci intestan kaj stomakan malsanojn, lumban kaj gamban malsanon, hemiplecion kaj neŭrastenion. Kaj krome, la akupunktura terapio servas por anestezo.

gambo. Foje, por rebati la pilkon li devis rapide retiriĝi pli malantaŭen. Tiel, kun neimagebla energio li ludadis 15 maĉojn tage kaj gajnis la ĉampionecon.

Naĝado por Li Chenggang estas pli malfacila ol aliaj disciplinoj, ĉar naĝado postulas ekvilibrecon de la korpo. Li devas ekvilibrigi la dekstran duonkorpon per la dekstra ŝultro kaj preni maldekstran gambon kiel la fiŝvoston. En la 100-metra rapidnaĝo li gajnis oran medalon per 1 minuto kaj 34.87 sekundoj. Tial, la respondeculo pri la sportkunveno deklaris, ke oni



*Kaŭteriza terapio*

Oni aplikas la akupunkturajn terapiojn plurmaniere. Iuj pikas ripetade per serio da pingloj la malsanan parton de paciento. La dispozicio de la pingloj similas al umefloro, tial la terapio ricevis la nomon "umeflora pinglaro". Aliaj enpikas arĝentajn pinglojn en korpopunktojn kaj trafluigas tra ili malfortan kontinuan kurenton por ricevi fortan eksciton, per kio ili povas kuraci malfacile kuraceblajn malsanojn. Tiu terapio nomiĝas elektro-pingla terapio. Triaĵ enpikas pinglojn sub la haŭton kaj ilin fiksas kaj post kelke da tagoj ilin eltiras. Tiu terapio nomiĝas

raportos lian rekordon al la Internacia Sporta Federacio de la Handikapuloj kiel novan rekordon de la A 9-klasa grupo de la membromankaj sportistoj.

Reveninte al Ĉinio Li Chenggang emocie diris al ĵurnalistoj: "De mia infaneco la kompato kaj ankaŭ la mokado el la socio ĉiam, de ambaŭflanke, instigis min batali por vivi kiel ordinara homo. Kvankam mi povas, kiel ordinara homo, prepari manĝaĵojn, lavi vestojn kaj ordigi ĉambrojn, tamen mi ne kontentas nur pri tio. Mi strebas fari ĉion, kion la ordinara homo povas.



subhaŭt-pingla terapio. Ĝi taŭgas por kuraci bronkan astmon, nervan kapdoloron kaj hipertension.


Ĉe la kaŭteriza terapio oni bruligas artemiziajn buletojn por varmigi koncernajn korpopunktojn aŭ la malsanan parton de paciento. Tiu terapio plej taŭgas por forigi malfortecon kaj malvarmon de paciento.

Ĉe la kupa terapio oni bruligas paperbuleton, rapide metas ĝin en kupon (aŭ en porcelanan vazon en grandeco de kupo) kaj alpremas la kupon fundo-supren al la malsana parto de paciento. Per tio oni ekspansiigas sangajn angiojn en limigita loko por akceli sangocirkuladon. Tiu terapio forigas la lumban kaj gamban doloron k.a.

Ĉe la kiropraktika terapio oni knedas la vertebran muskolon por kuraci dispepsion, vomadon kaj konstipon de bebo, hipertension, neŭrastenion kaj ulceron de plenkreskulo kaj nenormalan menstruadon kaj dismenoreon de virino.

Ĉe la skrapa terapio oni forte kaj unudirekte skrapas la dorsan, bruston aŭ aliajn partojn de paciento per ole-trempita rando de monero aŭ porcelana bovleto. Plurfojaj skrapoj ruĝigas la haŭ-

*Kupa terapio*



*Masaĝa terapio*



ton kaj donas kurac-efikon. Tiu terapio kuracas malvarmumon, akutan gastro-enteriton, kapdoloron kaj sunfrapon.


Ĉe la masaĝa terapio oni prempuŝas, pinĉas, premas, frostas, rule prempuŝas, knedas, skuas, tordas kaj frapas difinitajn partojn de paciento por vigligi liajn cirkulajn organojn, artikojn kaj akceli la funkcion de lia vitala energio kaj sango. Tiu terapio kuracas tordan aŭ kontuzan vundon, lumban kaj gamban doloron, tutan aŭ partan sententon de la membroj, gastralgion, dispepsion, lakson de bebo kaj ankaŭ servas por preventi malsanojn. Antaŭ kaj post sia ludo sportistoj akceptas masaĝon por vigligi siajn cirkulajn organojn kaj forigi lacon.

Krome, estas ankaŭ la profund-spira terapio, simila al sportado. Nuntempe nemalmultaj en Ĉinio lernas kaj praktikas tiun terapion. Pacientoj faras profund-spirajn ekzercojn por vigligi la cirkulajn organojn, akceli la funkcion de la vitala energio kaj sango kaj la metabolon kaj rebonigi la funkcion de ĉiuj organoj. Dum la ekzercado oni povas kuŝi, stari, gimnasti aŭ imiti flugil-etendadon de

gruo. Li tiel sin ekzercas, eniras en sinforĝesan staton, kaj tiam lia korpo aŭ parto de lia korpo ektremas senvole. Persista ekzercado povas faciligi siajn movojn, vigligi sian vitalan energion kaj plilongigi sian vivon. Tia ekzercado kuracas kormalsanon, koronarian kormalsanon, lumban kaj gamban doloron kaj neŭrastenion.

La supre menciitaj terapioj estas gravaj rimedoj por preventi kaj kuraci malsanojn. Ili, facile ellerneblaj kaj tre efikaj, povas ludi rolon, kiun medikamentoj eble ne povas.

*Profund-spira terapio*



# EN ALTLENEJO

de **JIA YE**

*Por kio strebas la nunaj ĉinaj studentoj? Kaj kiel ili pasigas tiun gravan periodon de sia vivo? Ĉi-sube ni prezentas al la legantoj studentinon Jia Ye kiel ekzemplon. Kvankam ŝi havas multe da ŝatoj kaj emas sin beligi, tamen ŝi plenenergie strebas nur al scioj.*

— La Red.

Dum lernado en mezlernejo mi jam aspiris viziti iun faman altlernejon, kiel la Pekina Universitato aŭ Qinghua-universitato. Mi bone sciis, ke eniri tian altlernejon estas tre malfacile. Por la enira ekzameno mi perdis neniun minuton por bone ellerni bazajn lernoobjektojn kaj legi diversspecajn librojn. Kiom da laboro, tiom da repago. En 1979 mia deziro efektiviĝis. Mi estis akceptita en la francling-

van fakon de la fakultato pri okcidentaj lingvoj kaj literaturo de la Pekina Universitato.

La Pekina Universitato havas vastan kaj pitoreskan korton, kun longa historio, multaj kompetentaj instruistoj kaj libroabunda biblioteko. Ĝi estas altlernejo kun glora revolucia historio. En la 4-a de majo de 1919, la studentoj de la universitato iniciatis la unua la ĉinan kontraŭimperiisman kaj kontraŭ-

feŭdisman movadon. Dum la pasinta longa tempo ĝi kulturis por Ĉinio grandan nombron da talentuloj.

Ekde la tago, kiam mi portis sur la brusto la emblemon de la universitato, mi jam decidis bone studi la fakajn sciojn por fariĝi homo utila al la socio. Mi bone scias, ke ĉiujare la ŝtato devas elspezi ĉ. 2 000 juanojn por ĉiu studento. La jara stipendio,

*La aŭtoro lernas fremdan lingvon.*





*Post la kurso*



kiun donas la universitato al studentoj, atingas 1 100 000 junaĵojn.

En la komenco mi ne tute kurtimigiĝis al la streĉa lernovivo, sed post nelonge mi jam adaptiĝis al la cirkonstancoj.

Je la sesa matene la universitato resendas la programon de Radio Pekino, kaj komenciĝas nia vivo: Ellitiĝo, tualetado, korpoekzercado kaj voĉlegado de fremda lingvo. Poste ni hastas al la studenta manĝejo por preni simplan matenmanĝon. Je duono post la sepa komenciĝas la unua leciono. Se la unuaj du horoj ne estas okupataj, tuj post la matenmanĝo ni iras al la biblioteko por mem lerni. Kvankam la biblioteko estas granda, tamen la studentoj estas tre multaj. Kiu venas tien malfrue, tiu ne povas gajni al si sidlokon. En la mezlernejo mi jam legis multajn librojn, tial mi opiniis, ke mi posedas riĉajn sciojn. Sed, post kiam mi vizitis la universitaton, precipe la bibliotekon kun tiel multaj libroj,

mi trovis, ke miaj scioj estas mizeraj. Ja la maro de scioj estas senlima.

Por laŭeble plivastigi la amplekson de niaj scioj la universitato instalas multajn lernoobjektojn. En la du- kaj trijaraj klasoj ni havas kurson eĉ en vespero. Krom la franca lingvo, ni lernas ankaŭ la historion de la franca literaturo, francajn historion kaj skizon, historion de la eŭropa literaturo, historion de la okcidenta filozofio, historion de la ĉina literaturo, ĉinan historion kaj ĉinajn modernan kaj antikvan lingvojn. El tiuj lernoobjektoj mi plej ŝatas la francan lingvon, francan historion kaj historion de la eŭropa literaturo. En la postkurso tempo mi ofte legas originalajn novelojn de Francio por pli bone posedi la francan lingvon.

Al mi plaĉas la altlernejaj instruaj metodoj. Instruistoj lekcias ne tiel detale kaj malrapide kiel mezlernejaj instruistoj. Ili ofte montras al ni kelkajn gravajn punktojn kaj kuraĝigas

nin digesti ilin per nia propra cerbumado. La instruistoj permesas al ni prezenti diversajn demandojn dum la kurso. Iuj el niaj demandoj estas naivaj, dum aliaj estas eĉ malfacile respondeblaj. Kiam ili ne povas tuj respondi niajn demandojn, ili modeste diras: "Lasu min studii tion poste." Ju pli niaj instruistoj estas afablaj kaj facile alir-eblaj, des pli ni respektas ilin. Ni havas sufiĉan tempon por nia dispono, sed ni neniom malŝparas ĝin. La memkonscio pri lernado kaptas plejparton de la studentoj.

Mi tre ĝojas, ke mi jam ellernis legi librojn dum la lernado en la universitato. Antaŭe mi pensis, ke la sola tasko en alta lernejo estas fosi en amaso da lernolibroj. Se oni tiel faras, li certe perdas multon. Unuflanke mi plej multe legas librojn, kaj aliflanke mi atente me legas gravajn elektitajn librojn. Post legado mi ĉiam rafinas kaj resumas la libron por posedi ĝian esencon. Krome mi



*Ŝi ludas volanon.*

ankaŭ foliumas gazetojn, referencajn librojn, listojn de novaj libroj, epitomojn de traktatoj kaj indeksojn de materialoj. Tio ne bezonas multe da tempo, sed tio helpas min en plivastigo de mia vidkampo.

Ĉiutage, de la kvara ptm. ĝis la vespermanĝo la studentoj faras korpajn ekzercadojn. Tiam estas la plej vivoplenaj horoj en la tago. Sur la sportejo iuj kuras, kaj aliaj ludas piedpilkon, flugpilkon kaj volanon.

Post la vespermanĝo estas unuhora libera tempo por studentoj. Iuj el ili promenas laŭ la lago, aliaj ludas muzikilojn en siaj dormĉambroj kaj triaj serioze kaj varme diskutas pri iuj problemoj. En varma somero ni ŝatas babili kelkope sub arboj en la korto por nin refreŝigi.

Por riĉigi nian vivon la universitato organizis multajn libertempajn societojn, ekzemple kultura societo, belarta societo, kurso de ĉina lukto, societo de

fotografiaj amatoroj, ĥoro kaj dancgrupo. Mi partoprenis la societon de fotografiaj amatoroj. Post lernado kaj praktikado mi nun jam povas lerte foti.

En la trijara klaso, mi estis elektita kiel vicestro de la departemento por eksteraj rilatoj sub la studenta asocio. Mi ofte kolektas de miaj kolegoj opiniojn pri la plibonigo de studenta vivo kaj plialtigo de instrua kvalito. Poste mi raportas tiujn opiniojn al gvidantoj de la universitato. Ili donas grandan atenton al tiuj opinioj kaj postuloj. Miaj kolegoj subtenas mian laboron kaj volas elverŝi siajn korajn vortojn al mi, eĉ plendas antaŭ mi. Mi ankaŭ havas ŝancon kontaktiĝi kun eksterlandaj studentoj, kiuj lernas aŭ vizitas en Ĉinio, kaj interŝanĝas kun ili lernosperton.

Post streĉa sestaga lernado mi revenas hejmen por pasigi la semajnfinojn kune kun miaj gepatroj. Mi estas solfilino. Miaj gepatroj tre amas min. Dimanĉe mia patrino ĉiam preparas por mi bongustajn manĝaĵojn. En

ferioj mi ofte faras ekskurson kun miaj kolegoj. En la someraj ferioj de 1982, mi vojaĝis al la fama marborda urbo Dalian en la Nordoriento por somerumi tie. Profitante feriojn mi ofte legas romanojn, rigardas teatraĵojn aŭ aprecas muzikon.

Ĉi-somere mi diplomitiĝos. Mi tre amas mian studentan vivon, ĉar ĝi ne nur donas al mi multajn sciojn, sed ankaŭ lernigas al mi kiel konduti. Sed nun mi jam preparas novan marŝon al la estontaj vivo kaj laboro, kiuj des pli min allogas.

---

## KOREKTO

por p. 16 de n-ro 11, 1982:

L. 23, dekstra k., anstataŭ "Ueda Kozoo" legu "Ueda Kozo".

por la klarigo de "Sur la Dorskovrilo" de n-ro 5, 1983:

L. 4, anstataŭ "Song Weitan" legu "Song Shengtan".



## Edziĝa ceremonio en reedukejo

**P**OSTTAGMEZE de la 14-a de februaro, la sekva tago de la Printempa Festo de la kuran-ta jaro, okazis eksterordinara edziĝa ceremonio en la halo de la Judong-a Reedukejo de la provinco Jiangsu. La juna novedzo nomiĝas Xu Qiu, kiu iam punlaboris en la reedukejo. Post sia liberiĝo li laboras en la Dua Biciklo-peca Fabriko de Suzhou. Pro tio li petis la permeson, ke li okazigu tie sian edziĝan ceremonion. Kaj oni akceptis lian peton. La novedzino Zhu Yulan laboras en fabriko de agrikulturaraj porkemiaĵaj aparatoj en la sama urbo.

Frapis la okulojn la granda ruĝa ideografiaĵo "feliĉo" sur la lazura kurteno en la halo ornamita per flirtantaj koloraj paperaĵoj bendoj. La halo pleniĝis de homoj venintaj por ĉeesti la ceremonion kaj dronis en gaja atmosfero. Inter ili estis respondeculo de la Provinca Reeduka Komitato, la gepatroj de la novedzo, liaj kunlernantoj, kolegoj, edukistoj kaj aliaj edukitoj.

La maljuna taĉmentestro Zheng Yanqiao, kiu prezidis la ceremonion, petis, ke la novedzo donu kelkajn vortojn. En varma aplaŭdado li stariĝis kun respekto kaj hontemo. Li estas altstatura, kun bela vizaĝo. Rigardante la prezidanton, li ekdiris kun tremantaj lipoj: "Mi tre dankas la Komunistan Partion kaj la registaron..."

Kial?

Antaŭ tri jaroj, la 22-jara Xu Qiu ekŝatis hazardludon. Pro tio li ofte luktis kun aliaj. Li iris tiun danĝeran vojon, pro kio la koncerna instanco kondamnis lin al tri-jara punlaboro. Li senespere venis al la konstrua taĉmento de la reedukejo. Li pensis, ke li perdis sian honoron. Tamen tuj en la unua tago, kiam li alvenis tien, estro Zheng Yanqiao afable interparolis kun li tri horojn pri la malutileco de hazardludo. En profunda nokto la estro portis al li manĝaĵon. De tiam li bone zorgis pri li kaj pacience lin edukis. Dum laborado la estro atentigis lin, ke li ne tro laciĝu. Kiam la junulo malvarmumis, la estro portis al li trinkakvon, medikamenton kaj ankaŭ bongustajn pladojn preparitajn de li mem. Xu Qiu plurfoje skribis al sia familio, dirante, ke la estro traktis lin kiel sian filon kaj montris al li la ĝustan vojon de la vivo.

Dume Zhu Yulan, la amatino de Xu Qiu, ofte veturis de Suzhou al la reedukejo por viziti lin, kun kukoj kaj bombonoj. Antaŭe ili estis nur simplaj geamantoj. Neniu el ili diris, ke ilia amo daŭros eterne. Sed ŝi ege malĝojiĝis, kiam ŝi legis lian leteron el la reedukejo plenan de malespero kaj pento: "Kara Zhu, mi ne taŭgas por via amo!..." Poste ŝi kvietiĝis, remaĉis liajn vortojn kaj ĝuis ian nedireblan dolĉon: Kiel bona

koro! La bonkora knabino pensis: Ĉu li ne fariĝos pli pesimisma kaj falos en pli grandan malesperon, se oni ne bone zorgos pri li? Kiom Xu Qiu bezonas mian konfidon, kuraĝigon kaj helpon! Naskiĝis en ŝi simpatia kaj amemo, ia mirinda forto. Ŝajnis al ŝi, ke ŝia koro pliproksimiĝis al la lia. Ŝi skribis leteron al Xu Qiu sen scio de sia patrino. Por inspiri al li diligentecon en lernado kaj aktivecon en laborado, ŝi diris en la letero: "Mi laŭeble helpos vin. Mi kredas, ke vi certe povos korekti vian eraron!"

La senlaca admono de liaj gvidantoj, majstroj kaj kolegoj kaj la plena konfido kaj inspiro de lia amatino donis al li grandan forton. Li pentis pri sia peko. Li decidis rebonigi sin per diligenta lernado kaj peniga laborado.

Baldaŭ Xu Qiu estis elektita kiel bona reedukito kaj poste kiel grupestro de la konstrua taĉmento kaj vicedestro de la komisiono por sekureco de produktado. Oni eĉ mallongigis lian reedukan limtempon.

Nelonge post sia sesafoja vizito al Xu Qiu, Zhu Yulan sendis al li longan leteron kun sia foto. Ŝi sincere skribis: "Xu Qiu, estu trankvila! Mi restos ĉiam via... Mi sendas al vi mian foton. Rigardu ĝin post laborado."



Reliefoj pri la vivo de Qu Yuan  
super la templa pordo



La templo de Qu Yuan



En la festotago in-  
fanoj ŝatas porti sa-  
keton kun aromaj  
herboj.

Oni ŝmiras en la festotago la frunton de la infano per realgaro  
por forigi tokson kaj fiinsektojn.




S-ro Zhu Wenrong

**Vicprofesoro**  
**Zhu Wenrong**

Fotoj de QU WEIBO





Ornamado de boato

Vicprofesoro Zhu Wenrong estas veterana esperantisto. Nun li laboras kiel vicprezidanto de la Jilin-a Esperanto-Instituto kaj vicestro de la oftalmologia sekcio de la Dua Hospitalo sub la Medicina Universitato N. Bethune, Jilin-provinco.

Li interesiĝis pri Esperanto frue en 1935, kiam li lernis en mezlernejo. En 1940 li lernis la lingvon en la Koresponda Esperanto-Lernejo funk-


ciigita de Venlo Fon kaj Eltunko. Nun li daŭre klopodas por disvastigi nian lingvon.

Li finis sian studon en la Sanhaja Nacidefenda Medicina Instituto en 1947. En 1980, sub lia gvido la Medicina Universitato N. Bethune elfaris fluorfotometron, la unuan en Ĉinio. Per ĝi li faris studon kaj publikigis tri disertaĵojn, kiujn alte taksis ĉinaj medicinaj fakuloj.




Zhu Wenrong (la dua de maldekstre) parolas en Esperanto-studrondo.






Li instruas Esperanton al siaj gefiloj.



Li kuracas malsanulon.



S-ro Zhu kune kun siaj helpantoj en malsanula ĉambro



La tuta familio de Zhu en parko



# Kiam la trajno haltas ĉi tie...

(Novelo mallongigita)

de TIE NING

SE oni ne inventus trajnon kaj ne etendus trakon en montaron, oni neniel povus trovi la vilaĝeton Taiergou, kiu kun dekkelkaj familioj sin kaŝas profunde en la montaro. Ĉiujare, de printempo ĝis somero, de aŭtuno ĝis vintro, ĝi ĝuas kareson de la montaro kaj silente elportas ĝiajn barbaraĵojn.

Oni ne memoras, de kiam ekaperis la nomo de Taiergou en la fervoja horaro. Precize je la sepa ĉiuvespere ĉi tie haltas unu minuton la trajno de Pekino al Shanxi-provinco.

La unu-minuta halto rompis la kvietecon de la vilaĝeto. Antaŭe la tieaj loĝantoj kutime enlitiĝis tuj post la vespermanĝo, kvazaŭ en sama momento ricevinte ordonon de la montaro, kaj tuj fariĝis morta silento. Sed nun, la knabinoj malpacientiĝas jam ĉe la vespermanĝo. Haste fininte manĝadon ili komencas tualeti: zorge kombi al si la harojn, lavi sian iom krudan ruĝvangan vizaĝon polvo-kovritan dum la taga laboro. Iuj vestas al si la piedojn per novaj ŝuoj ĝenerale portataj nur en la Printempa Festo kaj aliaj eĉ iom ŝminkas sin. Post tio ili sin direktas rapide al la fervojo. Ĉiam la unua eldomiĝas Xiangxue, ŝin sekvas la najbara knabino Fengjiao.

Je la sepa, kiam mallumiĝas, anhele enrampas en la vilaĝeton Taiergou la trajno. Kun forta ekstremo ĝi haltas. La knabinoj kun la batanta koro ĵetas sin al

la vagonaro kaj rigardas enen ĉe ĉiu fenestro. Sole Xiangxue staras malantaŭe, kun ambaŭ manoj kovrantaj la orelojn. Survoje al la haltejo ŝi ĉiam kuras ĉe la fronto, sed kiam venas la vagonaro, ŝi retiriĝas malantaŭ ĉiujn. Ŝi timetas la gigantan lokomotivon, kiu potence ŝprucigas blankan vaporon, kvazaŭ ĝi englutus la vilaĝeton per unu spiro. Ŝi timas ankaŭ ĝian terskuan muĝadon. Antaŭ ĝi ŝi ŝajnas herbeto senradika.

“Aŭ! Vi min piedpremis!” akre kriis Fengjiao al alpaŝanta knabino. Ŝi estas kriema eĉ pro bagateloj.

“Kial vi kriaĉas? Ĉu por elvoki la blankvizaĝulon?” kontraŭdiris la atakita knabino.

“Diablo vin prenu!” blasfemis Fengjiao, instinkte turnante sian rigardon al la pordo de la tria vagono.

Jen elvoniĝis la blankvizaĝa juna konduktoro. Li, altstatura kun nigra hararo, parolas bele laŭ pekina akcento. Eble ĝuste pro tio la knabinoj kaŝe nomas lin Pekina Akcento. Li, kun ambaŭ brakoj interkrucitaj sur la brusto, alparolas ilin en konvena distanco: “Hallo, knabinoj, ne alkroĉiĝu al la vagonaro! Estu singardemaj!”

“Ho, se ni estas etaj, ĉu vi estas ega?” brave kontraŭdiris Fengjiao.

La knabinoj eksplodis per ridego. Iu forte puŝis Fengjiao,

ke ŝi preskaŭ frapis sin kontraŭ lin. Tio tamen kuraĝigis ŝin. “Ej, ĉu vi ne sentas kapturiniĝon en la vagonaro?” ŝi demandis la konduktoron.

“Kion oni faras, se la trajno venas al loko sen fervojo?” demandis alia knabino.

“Kiom da fojoj vi urbanoj manĝas en la tago?” mallaŭte demandis ankaŭ Xiangxue.

“Nenio helpas!” grumblis la juna konduktoro, ĉirkaŭate de la knabinoj.

La knabinoj cedis al li la vojon nur, kiam la trajno estis tuj ekveturonta. Li saltis sur la vagonŝtupon kaj diris returnante sian kapon: “Nu, mi respondu al vi venontfoje!” Tuj sekve kun bruo fermiĝis la verda pordo de la vagono. La trajno sin ĵetis en la mallumon, forlasinte la knabinojn ĉe la malvarmaj reloj. Post longa momento ili ankoraŭ sentis la tremon de la trajno pli kaj pli malfortiĝantan.

Ĉio denove dronis en silento. Hejmenirante la knabinoj nature ekparolis pri la forpasinta trajno.

“Fengjiao, kial vi silentas? Ĉu vi sopiras al Pekina Akcento?” iu diris ŝerce.

“For! Kiu lin mencias, tiu lin sopiras.” rebatis Fengjiao kaj ekpinĉis Xiangxue je la mano, kiel signo, ke tiu ŝin helpu.

Sed Xiangxue mutis kun vango ruĝiĝinta de konfuzo. Ŝi, 17-jara knabino, ankoraŭ ne

sciis kiel helpi aliajn en tia okazo.

“Laŭ mi, vi estas allogata de li, sed vi malkuraĝas tion konfesi. Kiel blanka estas lia vizaĝo!” Post momenta silento la knabino daŭre ŝercis kun Fengjiao.

“Blanka? Sendube, tio kaŭziĝis de longa laborado en la sensuna vagono. Se li laborus en nia vilaĝeto. . .” iu diris en la mallumo.

“Se temas pri la blankeco, lasu lin kompari kun nia Xiangxue. Ŝia haŭto ja estas delikata denaske. Se ŝi bukligus siajn harojn, kiel knabinoj en la vagonoj, oho! kiel bela ŝi fariĝus! Franjo Fengjiao, ĉu vi konsentas?”

Fengjiao tamen nenion diris. Ŝi forlasis manon de Xiangxue. Ŝajne ŝi iom ofendiĝis de la subtakso de la knabinoj al tiu konduktoro. Ŝi firme kredas, mem ne sciante pro kio, ke lia vizaĝo estas naturdotite blanka, sed ne

pro longa laborado en la sensuna vagono.

Xiangxue senbrue etendis sian manon al Fengjiao kun signo, ke la lasta manpremu ĝin, kvaŭzaŭ petante indulgon de sia amikino, kiu ŝajne estis ofendita pro ŝi.

“Fengjiao, ĉu vi mutiĝis?” demandis ree tiu knabino.

“Kiu mutiĝis? Ĉu decas, ke vi interesiĝas nur pri lia vizaĝo? Se li al vi plaĉas, do vi iru kun li!” Fengjiao kontraŭdiris akre.

“Ni ne meritas tion!”

“Ĉu vi estas certa, ke li ne havas amatinon?”

. . .

Kiel ajn forte ili disputis survoje, tamen ili disiĝis amike, ĉar ilin ĝojigis la penso: Morgaŭ la trajno ree preterpasos kaj ili havos ankoraŭ belan minuto. Kompare kun tio la disputo estas simple bagatelo.



Poste, ili aldonis novan enhavon al la minuto. Ili, starante apud la vagonaj fenestroj, kun ovalaj korboj plenaj de nuksoj, kokovoj kaj jujuboj sur la brakoj, afable vendas ilin al pasaĝeroj por aĉeti al si sekigitajn nudelojn, alumetojn kaj harpinglojn, gazajn kaptukojn kaj nilonajn ŝtrumpetojn ŝatajn de knabinoj.

Ŝajnis, ke oni intence lasis Fengjiao rilatiĝi kun Pekina Akcento: Ĉiufoje ŝi kun la korbo iris al li. Komercante kun li, ŝi intence prokrastis tempon kaj enmanigis al li la ovoplenan korbon nur tiam, kiam la trajno estas tuj ekveturonta. Antaŭ ol li havos tempon por pagi al ŝi, la trajno jam ekmoviĝis. Pekina Akcento, starante en la vagono kun la korbo en la brako, mangestis al ŝi por ion klarigi. Tion vidante, ŝi kore ĝojis. Kompreneble, la junulo pagos al ŝi la monon en la venonta fojo, aŭ kunportos al ŝi grandan faskon da sekigitaj nudeloj, du pecojn da gazaj kaptukoj aŭ ion alian. Se li kunportis al ŝi, ekz. kvin kg. da sekigitaj nudeloj, ŝi certe restigis al li duonan kg.: laŭ ŝi, nur tiamaniere ŝi sentis sin trankvila en la kontakto kun li. Ŝi deziris, ke tia kontakto iom diferencu de ordinara negoco. Kelkiam ŝi rememoris la parolon de tiu knabino: “Ĉu vi estas certa, ke li ne havas amatinon?” Efektive, tio ŝin ne koncernas. Ŝi neniam pensis edziniĝi al li, sed tamen ŝi volas amikiĝi kun li. Ĉu nur lia amatino rajtas tiel fari?

Xiangxue estas knabino silentema kaj iom timema, sed favorata en la komercado. Pasaĝeroj ĉiam kun plezuro aĉetas ŝiajn objektojn, ĉar ili legas sinceran fidon en ŝiaj kristalaj



okuloj. Ŝi scias nek trompiĝon nek marĉandon. Ŝi nur diras: "Pagu kiom vi deziras." Kiu volas ruzi kontraŭ tia knabino? Antaŭ ŝi eĉ marĉandemulo fariĝas malavara.

Iafoje, profitante la okazon ŝi demandis pri eksteraj novaĵoj, ekzemple, ĉu la superaj lernejoj en Pekino akceptas studentojn el Taiergou; kio estas poem-deklamo akompanata de muziko (tion ŝi hazarde legis en iu libro). Foje ŝi demandis iun mezaĝulinon kun okulvitroj pri magneta krajonujo kaj ĝia prezo. Sed tiu ankoraŭ ne havis tempon respondi, kiam la trajno jam ekveturis. Ŝi postkuris ĝin longan distancon. Nur kiam ekmuĝis ĉe ŝiaj oreloj la aŭtuna vento kaj bruego de la trajnaj radoj, ŝi haltis, konsciinte sian naivecon.

La trajno malaperis en palpebruma daŭro. La knabinoj ĉirkaŭis Xiangxue kaj ekridegis, informiĝinte pri la afero.

"Malsaĝa knabineto!"

"Ne indas!"

Ili ameme frapetis ŝin je la ŝultroj, kiel pliaĝaj fratinoj.

"Mi kulpas. Mi demandis pri tio malfrue." Xiangxue ne opiniis tion bagatela.

"He, vi ne povas demandi pri io alia krom tio?" Fengjiao prenis la korbon de sur la brako de Xiangxue.

"Estas ne strange, ĉar ŝi estas lernantino," iu senkulpigis Xiangxue.

Eble pro tio, Xiangxue estas unusola mezlernejano en la vilaĝeto.

En Taiergou ne troviĝas lernejo, Xiangxue devas ĉiutage piediri 7.5 km. por viziti lernejon. Nature silentema, ŝi tamen havas multon por paroli kun

samvilaĝaj amikinoj. Sed en la mezlernejo la afero statas tute alie. Kvankam tie ne mankas knabinoj, tamen ili ĉiam per siaj kondutoj, okulsignoj kaj eĉ ride-toj konsciigas al ŝi, ke ŝi estas el malriĉa vilaĝeto. Ili intence demandas ŝin foje-foje, kial ŝi ne havas krajonujon.

Efektive, ili bone scias, ke la ligna skatoleto ĉe la angulo de la tablo estas ŝia krajonujo, tamen ili afektas ne scii tion. Ĉiufoje la knabino sidanta apud ŝi brue fermas kaj malfermas sian grandan krajonujon ŝaŭmplastan. Kvankam la ligna skatoleto de Xiangxue estas unusola en la vilaĝo, kaj farita de ŝia patro por ŝia uzo en mezlernejo, tamen kompare kun la krajonujo de la najbarino, ĝi aspektas mizere kaj malbele.

La koro de Xiangxue neniel povas kvietiĝi. Ŝi subite komprenis, kial la kunlernantoj foje-foje ŝin demandis pri la krajonujo kaj kiel malriĉa estas ŝia hejmvilaĝo.

Profunda aŭtuno. La monta vento fariĝis pli kaj pli forta kaj la vespera krepusko venis pli kaj pli frue. Tamen Xiangxue kaj ŝiaj kamaradinoj atendis la trajnon kiel kutime. Ili jam portis vatitan veston kun belaj desegnoj, kaj Fengjiao surhavis palrugan harplinglon el plastovitro, iuj eĉ ligis siajn harplektaĵojn per bela bendo; tiujn aĵojn ili akiris kontraŭ kokovoj aŭ nuksoj en la trajno. Ili sin vestis laŭ la maniero de la knabinoj-pasaĝeroj kaj staris en bona ordo apud la fervoj-linio, kvazaŭ ili estus bonvenigantaj honorajn gastojn aŭ estus revuotaj.

Haltis la trajno kun peza anhelado, kvazaŭ plendante pri la malvarmo ĉe la vilaĝeto. Ĝi montris eksterordinaran indi-

ferentecon al la vilaĝeto: Ĉiuj fenestroj estis strikte fermitaj, pasaĝeroj trinkis teon aŭ legis ĵurnalon en la palflava lumo, neniuj el ili ĵetis eĉ unu rigardon eksteren. Forgesis ŝajne la knabinojn de la vilaĝeto ankaŭ la konataj pasaĝeroj ofte veturantaj per tiu linio.

Fengjiao, kiel kutime, kuris al la tria vagono por serĉi la junan konduktoron, dum Xiangxue kun la kapo strikte volvita per purpura tuko iris laŭ la vagonaro. Ŝi staris sur la piedpintoj, tamen neniuj el la pasaĝeroj rimarkis ŝin. Kaj tiam ŝi vidis sur tableto plena de manĝaĵoj magnetan krajonujon — longe dezi-ratan de ŝi.

Ŝi konstatis, ke la krajonujo apartenas al la studentino-knabino sidanta ĉe la fenestro, kaj alpaŝis por frapeti la fenestron. La studentino, sin turninte, vidis la ovoplenan korbon de Xiangxue kaj svingis la manon kun bedaŭro sen intenco malfermi la fenestron. Neniu atentigis ŝin, ke la vagona pordo estas malferma, Xiangxue tamen kuris al ĝi kaj lerte saltis sur la ŝtupon kiel Pekina Akcento. Ŝi volis kiel eble plej rapide envagoniĝi kaj interŝanĝi la krajonujon kontraŭ ovojn. Verŝajne ĝuste pro tio, ke ŝi havas 40 ovojn en la korbo, ŝi tiel rapide decidis envagoniĝi.

Xiangxue jam staris en la vagono. Ŝi, firme tenante la korbon, atenteme faris unu paŝon antaŭen. En tiu momento subite ekstremis la trajno, kaj sekve fermiĝis la pordo. Apenaŭ ŝi konsciigis ke ŝi devas tuj elvagoniĝi, la trajno jam estis malrapide forlasanta la vilaĝeton. Xiangxue sin ĵetis al la vagona pordo kaj vidis, ke Fengjiao fulme malaperis for de la okuloj. Tio ne estis sonĝo, ŝi vere for-

lasis siajn amikinojn kaj sin trovis en tiu trajno kaj konata kaj fremda. Ŝi frapis fenestrovitron kaj kriegis: “Fengjiao, kion fari?”

La trajno senkompate galopis antaŭen, forlasinte la vilaĝeton malantaŭen en palpebruma daŭro. Ĝi kuris al la sekva haltejo Xishankou je 15 km. for de Taiergou.

La distanco de 15 km. estas ne menciinda por trajno. Babilante, la pasaĝero baldaŭ atingis la haltejon Xishankou. Tie envagoniĝis multe da homoj, sed elvagoniĝis nur unusola knabino. En la vagono iu ŝin detenis, sed ŝi senhezite elsaltis el ĝi, ĝuste kiel ŝi envagoniĝis.

Nun ŝia korbo jam malaperis. Ŝi ŝtele ŝovis la korbon sub la sidlokon de la studentino. En la vagono Xiangxue kun ruĝiĝinta vizaĝo diris al la studentino, ke ŝi volas interŝanĝi ŝian krajonujon per la ovojn. Aŭdintion, ruĝiĝis ankaŭ la studentino, kiu insiste diris, ke ŝi volas donaci la krajonujon al ŝi, sed la ovojn ŝi ne volas, ĉar ŝi manĝas en studenta manĝejo de la instituto kaj ne bezonas ovojn. Por ke Xiangxue kredis ŝiajn vortojn, ŝi montris la insignon de metalurgia instituto sur sia brusto. Xiangxue tamen opiniis ke la studentino trompas ŝin: ĉu ŝi ne havas hejmon? La knabino akceptis la krajonujon kaj restigis la ovojn en la vagono. Kvankam malriĉa estis ŝia hejmovilaĝo, ŝi neniam prenis alies objekton sen rekompenco. Poste, kiam la pasaĝeroj informiĝis ke ŝi devas elvagoniĝi en la sekva haltejo, ili admonis ŝin tranokti tie. La fervora kondukto eĉ proponis, ke ŝi tranoktu ĉe parenco de lia edzino, kiu loĝas apud la fervoja haltejo. Xiang-

xue ja ne volis tion fari. Tamen liaj vortoj iom ofendis la knabinon, ŝi koleretis pro maljusta traktado al sia amikino Fengjiao kaj la vilaĝeto Taiergou. Ĉu ŝi ne devas elvagoniĝi kiel eble plej baldaŭ? Jes, ŝi devas rapide elvagoniĝi, rapidi hejmen por ne malfruiĝi al la lecionoj en la sekva mateno. Tiam ŝi povos dignoplene malfermi sian librosakon kaj meti la krajonujon sur la tablon... Tiel pensante, ŝi diris al la admonantoj: “Ne gravas, mi jam alkutimiĝas al nokta irado.”

Nun la knabino sola staris en la haltejo Xishankou, adiaŭante la forkurantan trajnon per siaj okuloj. La trajno fine malaperis el ŝia vidkampo. Antaŭ ŝi prezentiĝis vasta spaco. Leviĝis malvarma vento kaj atakis ŝian maldikan korpon. Ŝi strikte ĉirkaŭvolvis sian kapon per la kaptuko kaj kuntiriĝinte sidiĝis sur relon. Ŝin kaptis timo al tiu nekonata Xishankou, al la ĉirkaŭa malluma montaro kaj al susurado de arbaro. Oh, kiom da tiaj arbaroj ŝi devas trairi survoje al la hejmo!

Leviĝis la plenluno kaj lumiĝis la silentan valon, palan vojon, velkiĝintajn herbojn, arbarojn, veprojn kaj groteskajn rokojn.

Ŝi stariĝis, sentante la venton ege mildiĝinta. Nun la montoj trankvile kuŝis en la klara lunlumo. Ŝi ne plu sentis timon kaj ekiris antaŭen grandpaŝe laŭ la ŝpaloj. Ŝajnis al ŝi, ke ŝi unuafoje rekonis la montaron ŝin nutrantan. Certe ŝanĝiĝos Taiergou. En ŝia imago prezentiĝis la sceno, ke tiam la knabinoj de Taiergou ne plu petos ion de aliaj kaj ne bezonos respondi al alies demandoj, male belaj junuloj de la vagonaro memvole


iros al ili por peti la manon, kaj pli longe restos ĉe la haltejo la trajno, eble tri, kvar aŭ eĉ dek minutojn. Ĝi malfermos ĉiujn siajn fenestrojn kaj pordojn al la vilaĝeto. En sama kazo, kiel hodiaŭ vespere, ĉiuj havos sufiĉan tempon por elvagoniĝi.

Xiangxue sentis sin pli kaj pli varma. Ŝi malvolvis la kaptukon kaj metis ĝin ĉirkaŭ sian kolon. La vento taŭzis al ŝi la harojn. Ŝi haltis por ordigi ilin. Kie estis la vilaĝeto? Ŝi rigardis antaŭen kaj vidis ke sur la reloj moviĝas nigraj punktoj. Ŝi proksimiĝis al ili kaj trovis, ke al ŝi iras renkonte homoj, la unua Fengjiao kaj post ŝi aliaj knabinoj de la vilaĝeto. Kiam ili vidis Xiangxue ili tuj ĉesis iri antaŭen.

Subite ŝi sentis korporemon kaj ekploris nereteneble. Antaŭ la majestaj kaj afablaj montegoj ŝi sentis fieron, kiun ŝi havis neniam antaŭe. Ŝi forviŝis la larmojn per sia mandorso kaj, tenante en la mano la krajonujon, kuris renkonte al la homamaso.

En la montvalo subite eksplodis ĝojaj krioj de la knabinoj. Ili vokis la nomon de Xiangxue, eĉis la antikva montaro, kvazaŭ huraante kune kun la knabinoj.

Ilustrita de **TONG DAORONG**






# MONATO

internacia magazino sendependa

Bedaŭrinde ne ekzistas multaj revuoj kia EL POPOLA ĈINIO, kiuj prezentas al vi interesajn artikolojn pri aliaj landoj. Sed ĉu vi jam konas la revuon, kiu raportas ne nur el unu sed el multaj landoj – ne pri la Esperanto-movado tie, sed pri politiko, ekonomio kaj kulturo?



En ĝi – kiel en EPĈ – raportas indiĝenaj aŭtoroj kaj fakuloj el siaj landoj, ne eksterlandaj korespondantoj senditaj tien de hejmaj redakcioj. Jen vere unika revuo, en kiu vi povas legi ekskluzive en Esperanto verkitajn artikolojn pri ĉiuj temoj de l' hodiaŭa vivo. Apartaj rubrikoj por infanoj, junularo, turismo, kuirado, hobbio, satiro, krucenigmo, novelo ktp. Krome MONATO eldonas ĉiujare unikan poŝkalendaron, en kiu apud kalendaro kun ĉiuj naciaj festoj de l' diversaj landoj vi trovas abunde valorajn informojn tute praktikajn. Petu provekzempleron de MONATO kontraŭ du internaciaj respondkuponoj ĉe la eldonejo TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio.



**Tarifo:** 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceteton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- \* Ĉiam konstante akceptas korespondo-proponojn kun japanoj, Japana Esperanto-Korespondo-Servo, ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, 561 Japanio.
- \* Grupo de Esperantistinoj, 16-19 jaraj, deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj. E. Grupo Domo "Lizike Hanĉar" Titova 24 a 62000 Maribor, Jugoslavio.

\* Grupo Esperanto Alicante, Junulara Sekcio, str. San Fernando 39-2-, Alicante, Hispanio, deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĝiuj temoj.

\* Balaram Pal, Vill-Selimabad, P.O.-Jamalpur, Burdwan Pin-713 408, W. B. India. 22-jara studanto de medikamento, tre interesiĝas pri ĉina akupunkturo, serĉas geamikojn por interŝanĝo pri akupunkturo.

\* 37-jara dommastrino serĉas gekorespondantojn pri ĉiuj temoj el t.m. kaj ĉefe pri manlaboradoj, orgenludado. Sinjorino Rita Bloom, Am Kirchensiek 29, D-3370 Seesen-1, Federacia Respubliko Germanio.

\* Vladimir Pys (37-jara teknikisto), Martinov 13, 72300 Ostrava-CSSR, dez. kor. kaj interŝanĝi pm., bk. kaj aliajn kolektaĵojn kun amikoj el tuta mondo.

\* 22-jara Javier Osma, Cra. 17C No. 59-37, Bucaramanga, Kolumbio, S.A. Dez. kor. kun samideanoj.

\* S-ro Ladislav Charvat, Tlapakova 22, CS-705 00, Ĉeĥoslovakio, volas kontakti kun fakaj kaj hobiaj entomologoj de Ĉinio, interŝanĝi literaturon, entomologiajn materialojn kaj interesajn de tiu ĉi fako.

\* Emerita instruistino volas korespondi tutmonde, esperante, angle, pri lingvoj, literaturo, ktp. Mollie Buckle, 53, South Street, Barming, Maidstone ME169EX Britujo.


\* 25-jara f-ino Mansureh Karimi, Gholhak-Dowlat-Merat st., Gole Sorkh-Alley 25, Tehran 19517, Iran, dez. kor. tutmonde pri ĉ. t.

\* S-ro Behram Nikpoor (21-jara), Mesbah Street, Godarzy Alley, No. 15 Karaj-Iran, dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, vojaĝado ktp.

\* Fraŭlo Behzad Hashemian (12-jara lernanto), Fourth House, first row, 30 buildings ASB Square, Azimiye, Karaj-Irano, dez. kor. tutmonde pri muziko, libroj, p.k. kaj p.m.

\* 14-jara Aniko Szakaly, Szombathely 9700, Baratsag ut. 3. IV

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Yongjing-gubernio
3. Suzhou
4. Luoyang
5. Xi'an
6. Chengdu
7. Wuhan
8. Ŝanhajo
9. Chongqing
10. Kantono
11. Liaoning-provinco
12. Jilin-provinco
13. Heilongjiang-provinco
14. Hunan-provinco
15. Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono
16. Tianjin
17. Sa'gya-gubernio



# La mallongtempa unuigo de la Okcidenta Jin-dinastio

de BA HONG



Cao Cao

periestro Liu Chan de la regno Shu kapitulacis. Post pereco de Shu, la regno Wu en la sudoriento de Ĉinio sola staris kontraŭ la potenco Wei kaj falis en danĝeran situacion. Dume ŝanĝiĝis ankaŭ la politika situacio de la regno Wei mem. La nepo de Sima Yi uzurpis regpotencon kaj fondis Jin-dinastion.

## PEREO DE LA CAO-FAMILIA REGIMO

Kiam Cao Cao estis en potenco, li invitis Sima Yi, faman nobelon, partopreni en la politikaj aferoj. Post kiam Cao Pi, filo de Cao Cao, surtroniĝis, Sima Yi fariĝis grava kortegano de la regno Wei. Dum la regado de la imperiestro Mingdi, nepo de Cao Cao, la trupoj komandataj de li sufokis la ribelon en Liaodong de la Nordoriento kaj repuŝis la atakon de Shu, tiel ke iom post iom li enmanigis la

militan potencon. Post la morto de Mingdi, kune helpis la okjaran imperiestron Cao Fang en administrado de la ŝtataj aferoj Sima Yi kaj Cao Shuang, membro de la imperiestra familio. Tiel formiĝis en la kortego du antagonismaj sektoj gvidataj de Sima Yi kaj Cao Shuang.

Cao Shuang proponis, ke la imperiestro promociu Sima Yi kiel sian instruiston, kio fakte malfortigis lian povon. Sed Sima Yi petis de la imperiestro permeson, ke li forlasu la kortegan oficon. Li hejme ŝajnis sin grave malsana kaj senkonscia por malakrigi la singardemon de Cao Shuang, kaj konspiris kun siaj subuloj kontraŭ la kortego.

En 249 p. K. Cao Shuang akompanis Cao Fang al la imperiestra maŭzoleo sude de la ĉefurbo por kulti la prapatrojn. Kaptante la ŝancon, Sima Yi faris ŝtatrenverson, en kiu Cao

**D**UM la periodo de tri regnoj, la regnoj Shu kaj Wu en alianciĝo kontraŭstaris al la regno Wei en norda Ĉinio pli ol 40 jarojn. En 263 p. K. atakata de la armeo de la regno Wei la im-

19, Hungario, ŝatus korespondi kun ĉinaj esp-istoj, kolekti bildkartojn.

\* 13-jara Mikael Hultgren, Roddargatan 2, S-603 65, Norrköping, Svedio, dez. kor. kun geesp-istoj, precipe kun tiuj en Ĉinio kaj Nepalo. Hobioj: poŝtmarkoj, libroj, astronomio.

\* Miguel Termes de ea Torre (emerita muzik-instruisto), c/. Pedro. Moragues 9, Barcelono 19, Hispanio, dez. kor. tutmonde, interŝanĝi p.m., p.k. ktp.

\* 14-jara Šosfaric Jadranka, Dolac 16, Yu-41230 Krapina Jugoslavio, dez. kor. kun geamikoj el Ĉinio.

\* 24-jara fraŭlo Frans Portelli, 67, Qormi Road, Marsa, Malta, deziras korespondi tutmonde kun

gejunuloj pri ĉ. t. kaj interŝanĝi bildkartojn.

\* 15-j. knabo Slawomir Lis, ul. W. Swietych 39, 32-650 Kety, woj. Bielskie, Pollando, dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj, sed speciale pri kemio.

\* 10-jaraj geknaboj ŝatus korespondi kun simila eksterlanda grupo. Adreso: La Klaso 4/B, Papa, Kerekes. 29, H-8500, Hungario.

Shuang estis mortigita kaj la ŝtata regpotenco falis en la manojn de Sima Yi.

Post nelonge Sima Yi mortis de malsano. Lia filo Sima Zhao daŭre regis la kortegon. En 254 p. K. li eksigis la imperiestron Cao Fang kaj surtronigis la 13-jaran Cao Mao. Tiu tamen ne volontis esti marioneto kaj diris al sia du subuloj: "La ambicio de Sima Zhao estas konata de ĉiuj, mi ne devas senfare atendi la morton. Vi nun devas kune kun mi ataki lin." La lastaj perfidis la sekreton al Sima Zhao.

Cao Mao estis mortigita, kiam li gvidis centojn da gvardianoj por ataki Sima Zhao. Kaj Sima Zhao surtronigis Cao Huan. Post la morto de Sima Zhao en 265 p. K., lia filo Sima Yan devigis Cao Huan abdiki la imperiestrecon kaj surtroniĝis mem. Jen komenciĝis la Okcidenta Jin-dinastio.

En 280 p. K. la Okcidenta Jin-dinastio pereigis la regnon Wu kaj tiel unuigis Ĉinion.

### SHI CHONG KAJ WANG KAI EN KONKURADO PRI RIĈECO

La regantaro de la Okcidenta Jin-dinastio dekomence jam montris sian ekstreman koruptecon. Sima Yan mem estis tia monarko, kiu pasie emis diboĉi. Li ankoraŭ ne estis kontenta pri miloj da belulinoj en sia palaco, kaj elektis por si 5 000 belulinojn el la palaco de la pereinta Wu. La amaso da belulinoj konfuzis lin tiel, ke li ne sciis ĉe kiu tranokti. Li ĉiutage plezurveturis en la palaco per kaleŝo tirata de ŝafoj. Kie la kaleŝo haltis, tie li diboĉis. Liaj edzino kaj kromedzinoj, por akiri lian favoron, metis antaŭ sia pordo freŝajn bambufoliojn

kaj verŝis salakvon survoje por allogi la ŝafojn.

Lin imitis ankaŭ liaj subuloj. Jen miniaturo de la putra vivo de la tiamaj regantoj estis tio: la du korteganoj Shi Chong kaj Wang Kai konkuris pri sia riĉeco.

Por montri sian riĉecon, Wang Kai uzis 20-kilometran paŝantoŝirman kurtenon el purpura silkajo, kiam li eliris el sia domo, dume Shi Chong uzis 25-kilometran paŝantoŝirman kurtenon el koloraj brokatoj. Venkite en tio, Wang Kai montris la koralon pli ol 70 cm. altan, donacitan de la imperiestro, fiere dirante, ke ĝi estas rara trezoro en la mondo. Vidinte ĝin, Shi Chong frakasis ĝin kaj sekve montris siajn bril kolorajn koralojn, el kiuj 6-7 estis altaj pli ol unu metron. Li senĝene diris: "Ili estas neniom raraj, se vi volus, prenu du grandajn!" Wang Kai deprimiĝis kaj konfesis la malvenkon.

Wang Kai kaj Shi Chong ofte aranĝis luksan festenon por gastoj en siaj hejmoj. Iufoje en la festeno Wang Kai ordonis, ke muzikistino ludu fluton por ĝojigi la gastojn. Dum la ludo la muzikistino forgesis parton de la muzikaĵo. Wang Kai rimarkis tion kaj ordonis mortigi ŝin. Dum regalo de gastoj Shi Chong ofte drinkigis ilin en akompano de belulinoj, se gasto ne volis drinki, Shi Chong do mortigis la akompanan belulinon. Foje iu gasto persiste rifuzis drinki, li do mortigis tri belulinojn.

### PEREO DE LA OKCIDENTA JIN-DINASTIO

Post la morto de la imperiestro Sima Yan, lia filo Sima Zhong surtroniĝis. Sima Zhong estis idioto. Dum lia re-


gado la landon plurfoje atakis naturaj katastrofoj. Multaj mortis de malsato. Oni raportis tion al li kaj petis lin alpreni rimedojn por helpi la plagitajn popolojn. Aŭdinte tion, li kun miro demandis: "Kial ili ne manĝas viandan kaĉon?"

Kvankam la imperiestro estis malsaĝa, tamen lia edzino Jia Nanfeng estis kapabla virino kun politika ambicio. Ŝi estis malkontenta, ke la ŝtata regpotenco estas tenata de la imperiestra patrino kaj ŝiaj parencoj, kaj kaŝe ordonis princojn Sima Wei kaj Sima Yun kun trupoj sub sia komando veni al la ĉefurbo kaj mortigis la imperiestran patrinon kaj ŝiajn helpantojn. Tio kaŭzis 16-jaran tumulton, en kiu implikiĝis ok princoj. Ĉinaj historiistoj nomis tion "ok-princa tumulto".

En la tumulto estis mortigitaj centmiloj da popoloj kaj estis serioze detruitaj la du famaj urboj Luoyang kaj Chang'an. Ankaŭ la regado de la Okcidenta Jin-dinastio estis multe malfortigita. Nelonge post la tumulto la diversnaciecaj popoloj ribelis unuj post aliaj kontraŭ la regado de la Okcidenta Jin-dinastio. Leviĝis ankaŭ la nacimalplimulto, kiuj antaŭe vivis en la norda kaj okcidenta partoj de Ĉinio kaj poste translokitaj en la basenon de la Flava Rivero (el ili la ĉefaj estis la hunoj, ŝjanbejoj, ĝjejoj, dijoj kaj ĉjangjoj). Ili fondis 16 regojn sinsekve en tiu periodo.

En 316 p. K. la armeo de la regno Han regata ĉefe de la hunaj nobeloj konkeris Chang'an, la imperiestro Mindi de la Okcidenta Jin-dinastio kapitulacis. Tiel pereis la putra Okcidenta Jin-dinastio, kies regado daŭris 52 jarojn.





## Novaj Tendencoj de la Monda Loĝantaro

de HOU WENRUO

**K**OMPARANTE la mondan loĝantaron en la lasta duono de la kuranta jarcento kun tiu en la unua, aŭ pli precize, komparante la mondan loĝantaron en la periodo inter la 50-aj kaj 80-aj jaroj kun tiu antaŭ la dua mondmilito, oni povas vidi kelkajn novajn tendencojn de la loĝantara kreskado.

### LA LOĜANTARA KRESKADO KOMENCIS MALRAPIDIĜI POST SIA KULMINO

Ekde la fino de la dua mondmilito ĝis la komenco de la 70-aj jaroj, la kreskado de la monda loĝantaro ĉiam plirapidiĝis kaj, kiel la registrita historio montris, atingis sian kulminon. Inter 1—1000 p.K. la monda loĝantaro kreskis meznombre je 0.02% ĉiujare, inter 1000—1500

p.K. je 0.1%, inter 1000—1800 p.K. je 0.2% kaj inter 1800—1900 je 0.6%. Ekde 1950 la kreskado multe rapidiĝis. Inter 1950—1960 la loĝantara kreskado meznombre estis 1.84% kaj inter 1960—1970 ĝi leviĝis ĝis 2%. Laŭ tia rapideco la loĝantaro en la mondo duobliĝos post 35 jaroj, dum en la paleolitiko tio bezonis 30 000 jarojn, en la unua periodo post Kristo 1 000 jarojn kaj pli poste kelkcent jarojn. En 1830 ĉ. 1 000 milionoj da loĝantoj vivis en la mondo kaj post cent jaroj, en 1930, 2 000 milionoj.

Kial la loĝantaro en la mondo kreskis tiel rapide ekde la mezo de la kuranta jarcento? La ĉefa kaŭzo kuŝas en tio, ke depost la dua mondmilito ĝis la komenco de la 60-aj jaroj aperis ĝenerale en la evoluantaj landoj alta tajdo de naskado, kiu daŭris pli ol

10 jarojn. La loĝantaro de la disvolviĝantaj landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko, kiu konsistigas 2 trionojn de tiu de la tuta mondo, kreskis rapide. De 1962 ĝis 1972, la meznombrata kreskado de la loĝantaro en Latinameriko estis 2.9% ĉiujare, en Afriko kaj Azio 2.5%, kaj en kelkaj landoj eĉ 5.8%.

Tamen, ekde la mezo de la 70-aj jaroj tiu kreskado komencis malrapidiĝi iom post iom. En la jaroj 1975—1980 la procentaĵo de kreskado de la loĝantaro malleviĝis ĝis 1.81%, kaj en 1981—1982 ĝis 1.7%.

### DU TIPOJ DE LA LOĜANTARA KRESKADO

En la lasta duono de la kuranta jarcento aperis du tipoj de loĝantara kreskado en la mondo. La unua tipo, kiu aperis en plejparto de la evoluantaj landoj,

estas karakterizita per malgranda naskokvanto, malgranda mortokvanto kaj malgranda kvanto de natura loĝantara kreskado.

Ĝenerale, tiu lando, kies naskokvanto estas malpli ol 2%, kies mortokvanto malpli ol 1% kaj kies kvanto de natura loĝantara kreskado malpli ol 1%, do eniras en la stadion de "tri malgrandaj kvantoj". Antaŭ ol la evoluintaj landoj eniris tiun stadion, ili jam trapasis la stadion de granda naskokvanto, granda mortokvanto kaj malgranda kvanto de natura kreskado, kio okazis ĝuste antaŭ la apero de kapitalismo. Post kiam komenciĝis la kapitalisma periodo, la vasta bezono de laborfortoj stimulis naskadon kaj, samtempe, la mortokvanto de beboj kaj tiu de la loĝantoj reduktiĝis pro la senĉesa disvolviĝo de la moderna medicino, kio fine estigis grandan naskokvanton, malgrandan mortokvanton kaj grandan kvanton de natura kreskado.

La alia tipo, al kiu apartenas la plejparto de la disvolviĝantaj landoj, estas karakterizita per granda naskokvanto, malgranda mortokvanto kaj granda kvanto de natura kreskado.

Ĝenerale, al tiu tipo apartenas la naskokvanto super 3% kaj la natura kreskokvanto super 1%.

### **GRANDKVANTA CIRKULADO DE LA MONDA LOĜANTARO**

Depost la dua mondmilito la loĝantaroj en la mondo havis cirkuladon.

Kampanoj grandkvante eniris urbojn, estigante grandan loĝantaran cirkuladon en diversaj landoj. En la unuaj jaroj de la kuranta jarcento la urbanoj konsistigis nur 1% de la monda

loĝantaro, sed en 1982, 37%. Duobla estas la kaŭzo, ke la kamparaj loĝantoj transiris en urbojn: unue, la agrikultura moderniĝo en la evoluintaj landoj multe reduktis la bezonon de laborfortoj en la kamparo; due, en la disvolviĝantaj landoj aperis superabundeco de kamparaj loĝantoj, tiel ke pli kaj pli multaj el ili devis sin turni al urboj por havigi al si okupon.

Post la dua mondmilito, la nombro de la monda loĝantaro rimarkeble ŝveliĝis, kaj sekve grandiĝis ankaŭ la skalo de internacia loĝantara cirkulado. Tiun cirkuladon estigis, krom la normalaj migradoj, unue, la resendo de militaj kaptitoj kaj loĝigo de internaciaj rifuĝintoj. Ekz., la nombro de militaj kaptitoj kaj iliaj familianoj resenditaj al Germanio kaj Japanio post la dua mondmilito atingis entute pli ol 20 milionojn da homoj, la fondiĝo de Izraelio kaŭzis cirkuladon al miliono da judoj kaj miliono da palestianoj, la apartiĝo de Pakistano disde Hindio sekvigis la internacian cirkuladon de 14 milionoj da loĝantoj, ktp. kaj due, la en- kaj elmigrado de laborfortoj, nome, la migrado de fremdlandaj laboristoj. Konstante troviĝas entute 30-40 milionoj da tiaj laboristoj, el kiuj pli ol 20 milionoj estas en Usono kaj Kanado, 3-4 milionoj en okcidenta Eŭropo kaj pli ol 2 milionoj en la petrol-eksportaj landoj de la Meza Oriento. Tiuj laboristoj plejparte venis el disvolviĝantaj landoj, sed ankaŭ el kelkaj evoluintaj landoj de suda Eŭropo.

### **LA VIVDAŬRO DE LA LOĜANTAROJ MULTE LONGIGITA**

En la primitiva socio la homa vivo meznombro daŭris malpli ol

20 jarojn. Kun la forpaso de tempo, ĝi longiĝis ĝis 25, 30 kaj 40 jaroj. Post la dua mondmilito la meznombra vivdaŭro de la mondaj loĝantoj rapide plilongiĝis kaj, kiel la statistiko en la jaro 1982 konstatis, atingis 60 jarojn, en la evoluintaj landoj eĉ 72 jarojn.

En 1950 la meznombra vivdaŭro en Usono estis 68.2 jaroj, kaj en 1982, 74 jaroj. En 1935 tiu de viroj en Japanio estis 64.9 jaroj kaj tiu de virinoj 49.6 jaroj, sed en 1974 ili plilongiĝis ĝis 71.2 kaj 76.3 jaroj respektive. La meznombra vivdaŭro en la disvolviĝantaj landoj ankaŭ rapide plilongiĝis. En 1948 tiu de la loĝantoj en Ganao estis nur 38 jaroj, sed en 1982 48 jaroj. En 1946 — 1949 la meznombra vivdaŭro de la viroj kaj virinoj en Filipinoj estis nur 48.8 kaj 53.4 jaroj respektive, sed en 1970 — 1975, 56.9 kaj 60 jaroj. Nun la meznombra vivdaŭro de la loĝantoj en Japanio kaj Islando estas 76 jaroj, tio estas la plej longa en la mondo.

### **REGISTAROJ LIMIGAS LA LOĜANTARAN KRESKADON**


La rapida kreskado de la monda loĝantaro vekis atenton ĉe pli kaj pli multaj registaroj. Ili komencis rekte aŭ nerekte limigi tiun kreskadon. Ĝenerale, la limigo estas en tri formoj: unue, la registaroj rekte praktikas limigon al loĝantara kreskado; due, la registaroj kun privataj organizoj en kunlaboro limigas la loĝantaran kreskadon; trie, la laboro estas plenumita per privataj organizoj pri familia naskolimito, dum la registaroj donas al tio nur aŭspicion kaj subtenon.

Ilustrita de **SUN CHENGWU**



YOU YUWEN:

# En strateto de Pekino



En mateno

**E**N la Okcidenta Distrikto de Pekino sin trovas Anyuan-strateto, unu el la pli ol 6 000 stratetoj de la urbo kun longeco de duonkilometro. Sur tiu asfaltita strateto povas paralele veturi du ŝarĝaŭtoj. Granda parto de la pekinanoj loĝas en tiaj aŭ ĉi tiaj stratetoj. En Anyuan-strateto loĝas pli ol 700 familioj, inter kiuj troviĝas tiuj de laboristoj, vendistoj, ŝoforoj, instruistoj, kuracistoj kaj ŝtatoficistoj.

## FRUMATENE

Ankoraŭ en matenkrepusko du maljunulinoj komencas purigi la strateton. Ili estas tieaj loĝantoj, kiuj respondecas pri purigado komisiita de la loĝantara komitato. Ĉiu familio donas al ili du-

dek cendojn monate kiel rekompencon.

Ĉirkaŭ la kvina matene sur la strateto jam estas movoj de homoj. Inter ili troviĝas laboristoj, kiuj rapidas al fabrikoj, maljunuloj, kiuj kuretas aŭ faras gimnastikajn ekzercojn, kaj mezaĝuloj, kiuj iras kun poŝ-radio-riciviloj al parko proksime de la strateto por partopreni en *tajĝiĉjuan*-sporto, kiun oni instruas ĉiutage. Ili sin ekzercas per *tajĝiĉjuan*, aŭskultante radiodisendon. Post la ekzercado ili aĉetas fritajojn ĉe proksimaj butikoj por siaj familianoj.

Post la sesa oni biciklas al sia laborejo.

En matenaj horoj estas tre streĉaj tiuj laboruloj-geedzoj, kiuj havas infanojn, sed al kiuj mankas helpo de maljunuloj. Ili devas kiel eble plej rapide plenumi ĉiujn hejmlaborojn antaŭ ol iri al sia laborejo. Iuj el ili preparas matenmanĝon kaj tagmanĝon por siaj infanoj, kiuj vizitas lernejon, dum aliaj urĝas siajn infanojn ellitiĝi kaj iri al infanĝardeno. Ĉirkaŭ la sepa sur la strateto aperas aro kaj aro da mezlernejoj kaj elementlernejoj kun librosako surdorse. Survoje iuj el ili legas parkere fremdlingvajn tekstojn aŭ tekstojn en la ĉina klasika lingvo, aliaj diskutas pri matematikaj ekzercoj, kaj triaj, pli junaj, rakontas sian sonĝon. Kaj tiam la

Prizorgantoj de la strateto



maljunuloj starantaj sur la strateto rigardas ilin per gajaj okuloj.

## PRIZORGANTOJ

Iom poste ekviglas membroj de la loĝantara komitato de la strateto. Ili devas prizorgi la vivon de la popolo, purigon de la medio kaj san-protektion de suĉinfanoj, interpacigi kverelantajn najbarojn ktp. La loĝantara komitato estas baza aŭtonoma organizo de ĉinaj urbanoj. Ĝiaj membroj estas elektitaj el la loĝantoj, plejparte emeritaj virinoj fervoraj por publikaj aferoj kaj tre konfidataj de la amasoj. Ĉiumonate la baza registara organizo, loĝkvartala oficejo, donas al ili rekompencojn.

La estro de la loĝantara komitato de Anyuan-strateto estas 50-jara virino, kiu nomiĝas Hu Sufang. Ŝi povoscias akupun-

turon kaj masaĝon, tial iuj loĝantoj, kiuj suferas malsanetojn, ofte ŝin vizitas.

Ŝia edzo laboras en la Pekina Tria Vesto-farejo. Se li estas libera, li ĉiam servas kiel helpanto de la komitato laŭ la peto de sia edzino. Ĉar sur Hu Sufang ne pezas dommastruma ŝarĝo kaj plie ŝi estas tre fervora por la publika bono, tial ŝia hejmo ofte fariĝas oficejo de la komitato. Vizitantoj venas al ŝi unuj post aliaj de mateno ĝis vespero. Ŝi laboris jam plurajn jarojn. Ŝi rigardas la strateton kiel sian hejmon. Ŝi montras sin ĉiam kontenta kaj ĝoja, vidinte, ke la strateto fariĝis pura, kun plantitaj floroj kaj herboj en kelkaj lokoj, kaj iuj junuloj infektitaj de malbonaj kutimoj reboniĝis kaj devokonscie plenumis sian laboron dank' al edukado de la komitato.

## KVIETO

Post kiam la plenaĝaj laboruloj kaj lernantoj foriras, en la strateto ekregas relativa kvieto. Regule venas legom-vendistoj por servi al loĝantoj, kaj okaze montriĝas tranĉil-akrigistoj, kies krioj rompas la kvieton de la strateto. Krome, sub arboj sidas maljunuloj interbabilantaj. Ne ĉie en la urbo estas tia kvieto. Eble pro tio nemalmultaj homoj preferas stratetojn de Pekino.

Posttagmeze, kiam oni revenas de fabrikoj kaj lernejoj, en la strateto denove leviĝas bruo miksitita kun tintado de bicikloj, kiu daŭras ĝis la sepa vespere. Tiam multaj familioj finas vespermanĝon kaj eksidas antaŭ televidilo por rigardi programerojn. Por progresigi la lernadon de infanoj, oni ne lasas ilin daŭre televidi, kaj tiam antaŭ la televidilo restas nur maljuni-

loj, ĉar mezaĝuloj kaj junuloj devas sin okupi pri dommastrumado k.a. Kaj oni povas enlitiĝi nur je la deka nokte.

## ĜUIGA AKTIVADO

Bone iras la verdiga laboro en Anyuan-strateto. La strateton ombras verdaj arboj. En la pasinta jaro la komitato kreskigis florojn kaj herbojn ĉe iuj lokoj por beligi la strateton.


Tiu strateto estas en malnova loĝkvartalo, kie troviĝas neniu nova etaĝdomo, sed nur malnovtipaj kvadrataj kortoj ĉirkaŭitaj de muroj. En la kortoj oni plantis belajn florojn. En la n-ro 19 loĝas Xu Runfang, kies korto kun areo de apenaŭ dek kvadrataj metroj estas plena de pli ol 30 specoj de floroj, kiel peonioj kaj rozoj, kaj sur kies fenestrobreto ĉarmas floroj en potoj. Antaŭ du jaroj ŝi kaj ŝia edzo emeritiĝis kaj iliaj gefiloj, kiuj jam edziĝis aŭ edziniĝis, vizitas ilin nur dimanĉe. Tial floroj fariĝis nemalhaveblaj por ilia vivo. Xu Runfang diris: "Plantado de floroj estas aktivado ne nur saniga, sed ankaŭ ĝuiga."

## GRANDA FAMILIO

Multaj domoj en Pekino estas tre dense loĝataj. Ekzemple, en la korto n-ro 20 staras du domoj kun ĉirkaŭ 40 kvadrataj metroj, kie loĝas granda familio. Huang Jing, 49-jara dommastrino, estas inĝeniero de la Pekina Konstrua Projektejo. Ŝia edzo instruas en Qinghua-universitato. Ĉar ĝi situas en la malproksima nordokcidenta antaŭurbo, li hejmen revenas nur unu fojon ĉiusemajne. Lia patrino kaj la familio de lia fratino vivas kune kun ili.

(Daŭrigota sur p. 49)


Verdigado





# Rido junigas

de J. M. van der Hoeven  
(Nederlando)



## Instruado

Instruisto: "Supozu, ke mi fokus ĉi-tie tunelon aŭ truon rekte tra la tero. Kien mi alvenus?"

Lernanto: "En la frenezulejon, sinjoro."

## Ĉe turisma servo

Belgo staras antaŭ ĝiĉeto de turisma servo kaj demandas: "Fraŭlino, kiel longe daŭras flugo al Ĉinio?"



"Momenton, sinjoro," diras la knabino.

"Dankon!" diras la belgo kaj foriras.

## Romantiko

Juna kamarano volis peti la manon de knabino, sed mankis al li la kuraĝo. En bela libertago ili kune promenis ĉe tombejo kaj subite la junulo trovis motivon: "Rigardu, ĉi-tie kuŝas mia avo, tie mia patro kaj ĉi-tie ankoraŭ aliaj familianoj. Ĉu ankaŭ vi ne volus kuŝi ĉi-tie?"

## Neatendita respondo

"Ĉu vi ankoraŭ estas fianĉo de Ba-mi?"

"Ne. Ne plu."

"Gratulon! Kiel vi saviĝis de tiu fianĉinaĉo?"

"Mi edzinigis ŝin."



## En klara lingvo

Telegrafejo atentigas per jena skribaĵo la klientojn: "Escepte de la telegramoj de magistrato kaj registaro ĉiuj telegramoj devas esti redaktitaj en klara lingvo\*."

\* T.e. ne kripta lingvo.

Ilustrita de LJPAN

## HISTORIAJ OBJEKTOJ



de **PENG ZHANKUI** kaj **FAN PING**

**S**UDE de Xigaze, la dua granda urbo de Tibeto, estas la antikva kultura urbo Sa'gya, kie sidas la fame konata Sa'gya-temple. Antaŭe la templo dupartiĝis sude kaj norde. Ruiniĝis la norda kaj restas nur la suda, kiu konstruiĝis en 1269, post kiam Basiba, la estro de Sa'gya-sekto de lamaismo, akiris povon praktiki teokratian regadon en Tibe-

to kun subteno de Yuan-registaro.


La suda Sa'gya-temple estas grandioza kaj impona, kun areo de pli ol 14 700 kvadrataj metroj. Ĝin preterfluas Chongqu-rivero kaj transe staras Benbomonto. La templo konsistas el pompa kvadrata konstruaĵaro kun la orbrila granda sutro-halo kiel la ĉefa parto. En la norda

flanka halo troviĝas 11 arĝentaj relikvo-pagodetoj por Sa'gya-reĝoj. Ankaŭ la suda flanka halo servas por konservo de sutro. Krome, en la templo estas ankaŭ oficejo de Sa'gya-reĝoj kaj loĝdomoj de la lamaoj. Tiuj flankaj haloj kaj la granda sutro-halo formis grandan kvadratan korton. La templo estas ĉirkaŭita de ringmuro pli ol dek metrojn alta kun parapeto, kaj ĉe ĉiu angulo staras po unu turo, ĝi vidiĝas kiel urbo en malproksimeco kaj templo en proksimeco.

Enirinte la korton de la granda sutro-halo, oni tuj vidas la kolorajn pordoframojn, fenestroframojn, murojn kaj ĉevronajn kapojn. Estas blindige brilaj la sep diverskoloraj ĉevronaj kapoj super ĝia pordo, ĉiu kun kolorriĉa ligna unukornulo, ili faris la malhel-ruĝan pordon de la sutro-halo pli impona.


La sutro-halo havas areon de pli ol 5 750 kvadrataj metroj kaj altecon de ĉirkaŭ dek metroj. En la halo staras 40 kolonegoj en kvar vicoj subtenantaj la tegmenton. El ili la plej dika havas diametron de 1.2 metroj kaj la plej maldika, unu metro. Sur la

### *Sutro-halo*





*Pattra-sutro*



kvar plej dikaj kolonoj estas po unu orita statuo de Budho kun alteco de unu metro. La tuta grandioza konstruaĵo estas en la tibeta kaj han-a stiloj.

En la halo sidas vicoj da buterlampoj, malantaŭe kaj ambaŭflanke de ili staras tri grandaj oritaj latunaj statuoj de Budho, kaj antaŭe kaj ambaŭflanke de ili staras ĉ. mil oritaj statuoj de Budho en malsamaj grandecoj kaj pozoj, ili donis al la impona halo misteran koloron.

Antaŭ la statuoj estas multaj altvaloraj historiaj objektoj, inter kiuj troviĝas porcelanaĵoj faritaj en la periodoj de la 13-a ĝis la 19-a jarcentoj kaj botoj, ĉapo, kasko, kiraso, edikto kaj stampilo donitaj de imperiestro de Yuan-dinastio al Basiba en la 13-a jarcento.

En la halo estas ankaŭ granda eburo longa je pli ol unu metro

kaj rinocera korno. Rimarkinda estas blanka litorino konservata en vitroŝranko pli ol unu metron alta. Legendo diras, ke la litorino unika en la mondo iam estis uzita de Ŝakjamunio, la kreinto de budhismo. Ĝi estis donacita de hinda reĝo al Kublaj-Hano, imperiestro de Yuan-dinastio (1271 — 1294), kiu transdonacis ĝin poste al Basiba.

Malantaŭ la tri grandaj statuoj de Budho staras granda librobretaro 60 metrojn longa kaj 10 metrojn alta. Sur la bretaro kuŝas pli ol 28 000 volumoj de budhismaj sutroj, kies plejparto estas klasikaj budhismaj verkoj antaŭ la 13-a jarcento. Inter tiuj klasikaj iuj estis skribitaj per ora aŭ arĝenta inko aŭ per cinabro. En la dua etaĝo de iu templo domo troviĝas biblioteko, en kiu oni konservas multajn antikvajn librojn pri historio, medicino, kalendaro, astronomio,

geografio, literaturo, biografioj de famuloj kaj gramatiko de la tibeta lingvo. Tiuj libroj estas valoraj por esplori la disvolviĝon de la tibeta religio kaj la politikan, ekonomian kaj kulturean historion de Tibeto.

En la templo konserviĝas ankaŭ “*pattra-sutro*” rara en la mondo. (*Pattra* estas arbo kreskanta en Hindio.) Oni diras, ke tiu sutrolibro kun historio de pli ol mil jaroj konsistas el *pattra*-folioj, sur kiuj oni skribis sutron. Iuj folioj surhavas portreton de Ŝakjamunio.

Sa’gya-templo estas tre riĉa je murpentraĵoj. Ĉie en la templo estas murpentraĵoj pri figuroj de Budho, budhisma rakonto, pejzaĝo, floroj kaj homfiguroj. Iuj el la murpentraĵoj neniam estis rekolorigitaj kaj riparitaj en centoj da jaroj, ili tamen restis ĝis nun helkoloraj, kun klaraj desegnostrekoj.

(*Daŭrigo de p. 46*)

La maljuna patrino Cui Shifu estas diligenta kaj simpatia. Ŝi egale traktas siajn filinon kaj bofilinon. Ĉiutage ŝi ellitiĝas la unua por prepari matenmanĝon por la tuta familio. Post matenmanĝo ŝi devas purigi la du ĉambrojn kaj prizorgi sian nepon.

Ŝiaj gefiloj ĉiumonate donas al ŝi monon por la manĝokosto de la familio. En sia libertempo Huang Jing kiel eble plej multe plenumas hejmlaborojn, por ke la maljunulino ne tro laciĝu. En la pasinteco, Huang Jing ĉiudimanĉe devis lavi vestojn aŭ litkovrilojn de la tuta familio. En

1981 ŝia edzo aĉetis lavmaŝinon, kiu multe malpezigis ŝian ŝarĝon.

Malgraŭ ke la maljunulino okupas sin per la peza dommas-trumado, ŝi estas kontenta pri sia familio. Ŝi diris: “Mi prizorgis dek du infanojn. Mi tre ĝojas, ke iuj el ili fariĝis avangardaj laboristoj kaj aliaj elstaraj lernantoj.”

## En hejmloko de silko

de LI PING


### 10. nov. SONORADO DE HANSHAN-TEMPLO

Mi ekveturis de Wuxi kune kun turista grupo el San-Francisko. Post kvar-hora vojaĝo sur la Granda Kanalo en drakboato ni atingis la templon Hanshan en la antaŭurbo de Suzhou tagmeze. Anstataŭ ripozi mi direktis min rekte al la templo, adiaŭinte la usonajn amikojn.

Survoje mi pretervole rememoris versaĵon de Zhang Ji, poeto de Tang-dinastio:

*Ĉagrene grakas korvoj je l' lunfal'  
kaj prujnprospero,  
maldormon trudas fiŝboataj lumoj kaj acero.  
De Hanshan-templo ekster Gusu  
sonorad' alŝvebas,  
en noktomez' al nia ŝipo gasta sur rivero.*

*Arka ponto ekster la templo Hanshan*



Tien min allogis ĝuste tiu poemo kun delikata malĝojo, sed ne la fama templo. Frue en mia infaneco mi jam parkerigis la poemon helpe de mia patro.

La templo konstruiĝis en la sesa jarcento. Oni diras, ke ĝi akiris sian nomon pro tio, ke tie iam loĝis bonzo Hanshan en Tang-dinastio (618-907 p.K.). En la poemoj de la bonzo bone esprimiĝis esenco de la orienta filozofio, tial lia poemaro ĝuas altan prestiĝon inter la eŭropaj kaj usonaj literaturistoj en la nuna tempo.

Ekstere de la templo preterfluas la Granda Kanalo, super kiu kuŝas arka ponto. Interne de la templo prosperas maljunaj arboj ĉielskrapan-taj, la majesta ĉefhalo sentigas solenecon kaj budhostatuoj ene impresas per viveco. Sur la muroj de la ĉefhalo estas ĉizitaj 36 poemoj verkitaj de Hanshan.

Aŭdiĝis sonorado. Mi turnis min al la direkto de la sono kaj vidis, ke tie kelkaj japanaj turistoj frapis grandan sonorilon unu post alia. Ili kun pia mieno preĝis, eble por peti benon de budho. Ankaŭ mi batis ĝin trifoje, kaj aŭdiĝis sono surdiga kaj animskua.

### 11. nov. EN SUZHOU

La urbo Suzhou konstruiĝis en la sesa jarcento a.K. Ekde Tang-dinastio ĝi pli kaj pli prosperiĝis kun la disvolviĝo de la komerco kaj metiindustrio. Sur la ŝtonaj bildoj gravuritaj en Song-dinastio videblas la konturo de la malnova Suzhou kun interkruciĝantaj stratetoj kaj kanaletoj antaŭ pli ol 700 jaroj. Cirkulas de la antikveco en la sudo de Jangzi-rivero la popoldiro: "Suzhou kaj Hangzhou estas paradizo sur la tero".

En tiu akvoriĉa urbo ĉarmas naturaj pejzaĝoj. En la pasinteco, por ĝui naturan belaĵon iuj bienuloj, erudiciuloj kaj emeritaj oficistoj konstruigis sume pli ol 150 ĝardenojn kun klasikaj stiloj. Ĉiu el ili havas siajn proprajn stilon, aranĝon kaj strukturon, kiuj reprezentas arkitekturon de malsamaj dinastioj.





*Rivereto en Suzhou*

En tiuj ĝardenoj mi plej ŝatas Liuyuan. Ĝi havas historion de pli ol 400 jaroj kaj famas pro sia strikteco de la aranĝo, delikateco kaj varieco. Dum ĝia konstruado oni talente uzis kontraston de zigzago kaj rekto, helo kaj malhelo kaj alto kaj malalto. Al la elirejo kondukas modesta koridoro, tra kies lignaj fenestretoj videblas pavilonoj kaj kioskoj en la korto. Mi grimpis sur la altajn de la ĝardeno kaj ĉirkaŭprenis per unu rigardo la maljunajn arbojn, kuriozajn ŝtonojn, domojn, pavilonojn, zigzagajn koridorojn, klarajn lagetojn kaj pontetojn. Kun blovo de milda vento, susuris aceraj folioj sur la vojstreko.

La stratetoj de Suzhou estas gustoplenaj. Longaj kaj zigzagaj ili estas pavimitaj per ŝtonetoj. Altajn kortmurojn ambaŭflanke de la stratetoj plenkovras grim paj plantoj kiel hedero, trans iuj elrigardas verdaj arbobranĉoj. El kortoj aŭdiĝas de tempo al tempo krakado de teksiloj. Estas malfacile imagi, ke la silkajoj mond-famaj estas produktitaj en tiuj malgrandaj stratetoj.

Frue antaŭ 2 000 jaroj la tieaj popolanoj jam komencis kulturadon de morusarboj, bredadon de silkraŭpoj, elbobenigon kaj silkan teksadon. En la 11-a jarcento la silko de Suzhou jam famiĝis eksterlande kaj fariĝis unu el la ĉefaj eksportaĵoj de Ĉinio. Nun ĝi restas grava tradicia produktaĵo multe zorgata en la urbo. En Suzhou estas pli ol dek relative grandaj silkfabrikoj, kiuj ĉiujare produktas 50 milionojn da metroj da silko.

En la lastaj jaroj formiĝis en la urbo kompleta silkindustria sistemo kaj instaligis esploraj institutoj kaj koncerna altlernejo.

## 12. nov. SHENGZE — HEJMLOKO DE SILKO

Shengze ĉe la bordo de la Granda Kanalo estis unu el la tri grandaj silkmerkatoj en la antikva Ĉinio. Tiam oni laŭdis ĝin kiel lokon, kiu “produktas ĉiutage dekmilojn da metroj da silko kaj per ili kontentigas la bezonon de la tuta lando”.

Shengze ŝin trovas ĉe la limregiono de la provincoj Jiangsu kaj Zhejiang. Ĝi prosperiĝis kun disvolviĝo de silka metiindustrio. En la dinastio Tang la tieaj silkajoj servis kiel tributo al la kortego. En la verko “Admonoj por la Socio” de Feng Menglong (1574-1646), fama novelisto de Ming-dinastio, oni povas trovi detalan priskribon pri la loko: “Bruas tra la tuta nokto teksiloj, konkurencas pli ol mil silkvendejoj ambaŭflanke de la stratetoj, venas al la urbeto metiistoj el malproksimaj kaj proksimaj vilaĝoj kun siaj produktitaj silkoj, svarmas komercistoj el diversaj lokoj por aĉeti silkojn, kiuj interpuŝe plenigas ĉiujn vojojn. Multaj lokoj bredas silkraŭpojn sude de Jangzi-rivero, sed Shengze estas la plej prospera el ili”.

Malgraŭ la ŝanĝiĝo de la epoko nun Shengze restas unu el la ĉefaj silkproduktaj bazoj de

## VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO (6)

Ĉinio. Ĝi havas nur iom pli ol dudek mil loĝantojn, el kiuj pli ol dek mil sin okupas pri silkproduktado. En Shengze estas sume pli ol 2 500 aŭtomataj teksiloj, kiuj ĉi-jare povos laŭtakse produkti 40 milionojn da metroj da silko. La kvanto de ĝia silko por eksporto konsistigas sesonon de tiu de la tuta lando, kaj la varoj vendiĝas en pli ol 50 landoj kaj regionoj.

Mi vizitis silkteksan fabrikon Xinlian en Shengze. En 1953 ĝi ekfunkciis kaj havis nur kelkdek teksilojn. Tiam ĝi povis produkti nur kotonan ŝtofon. En 1958 ĝi komencis produkti silkon. En la pasintaj 30 jaroj ĝi disvolviĝis tre rapide kaj nun jam fariĝis granda moderna fabriko de monda nivelo. Plejparto de ĝiaj pli ol 1 700 laboristoj kaj oficistoj estas virinoj. Nun ĝi produktas silkon de 35 specoj, ĉefe altklasajn teksaĵojn, kiuj havas grandan debiton en la internacia merkato. Kelkaj specoj de ĝiaj produktaĵoj estas honoritaj de la ministeria kaj provinca instancoj kiel bonkvalitaj. La rigora administrado de la fabriko profunde min impresis.

Silko-instituto kaj Silko-specimena Fabriko havas sian lokon en la okcidenta antaŭurbo de Shengze. En la vasta akceptejo Song Bingqiu, estro de la instituto kaj fabriko, rakontis al mi pri la disvolviĝo de la silkindustrio de Shengze. En lia akompano mi rigardis ĝian eksponejon de la produktaĵoj, kie diverskoloraj silkoj de kelkcent specoj trembrilis en forta lampolumo. Song diris, ke la silko de Shengze havas grandan debiton en la okcidenteŭropa merkato pro sia bonkvalito kaj varieco de koloroj. Ĝi estas plej bona en la egala streĉeco kaj ne deformiĝas, eĉ se plenkreskulo kuŝas sur ĝia tre maldika silkteksaĵo.

En Shengze estas pli ol dek diversaj ŝtonpontoj. Sur iuj el ili registriĝis historio pri la silko de la urbeto. Sur la ponto Blanka Drako konstruita en Ming-dinastio gravuriĝis versparo:

*En suno ondas silksari' senfina,  
en vento muĝas simfoni' maŝina.*


Tio bone esprimis la prosperecon de la siatempa silkindustrio.

En la akompano de inĝenierino de la gubernia tekstila buroo, mi vizitis parkon de la

urbeto, kie regis plena kvieteco. "Nun estas tempo de laboro," diris la inĝenierino, "ĉi tie estas mondo de emeritoj matene, ili promenas aŭ faras ĉinan tradicion gimnastikon *Tajĝiĉjuan*. Nokte ĝi estas okupita de junaj geamantoj." Amuzejo por infanoj en la parko estas pura kaj bela. Ŝi diris ankaŭ, ke en la urbeto jam estas kinejo kaj kultura domo de laboristoj. Tamen por riĉigi la kulturan vivon de laboristoj kaj infanoj oni konstruas novan kinejon kaj relajstacion de televido por servi al la pli ol 3 000 televidiloj de la urbeto.

Revenvoje mi iris inter homamasoj rapidantaj hejmen post labordejoro. Belvestitaj geknaboj viglaj vidiĝas en si junecon. Mi subite ekmemoris la silkojn montratajn en la eksponejo. Ĝuste ili kreis tiujn riĉaĵojn. La silko el iliaj manoj kvazaŭ la Granda Kanalo torentas malproksimen al estonteco.

### MAPO DE LA GRANDA KANALO DE ĈINIO







# SHENGZE—LANDO DE SILKO


Fotoj de YAN JIN



Shengze ĉe la Granda Kanalo



La ponto “Blanka Drako”



Elbobonado de kokonoj






Silka ŝtofo kun florajoj



Silko-teksado

Kontrolo de produktajoj




# La templo Sa'gya

Fotoj de GU SHOUKANG kaj KANG SONG

Latuna budhostatuo kun duobla korpo









Kiraso donacita de la imperiestro de Yuan-dinastio al Basiba

Bildo pri Sa'gya-sekto



Sutro-halo





“Lago en Matenkrepusko” (supre), verko de ĉina pentristo Xu Xi, estis honorita per la granda premio de la Komunumo de Kultura Aŭtonoma Intereso de Rijeka, en la Oka Internacia Ekspozicio de Pentraĵoj aranĝita de UN aŭtune de 1982. La pentraĵo prezentas la pejzaĝon de la lago Taihu de Ĉinio. La nebulo sur la akvo, la velantaj boatoj, la teruritaj birdoj kaj la flagranta lumo kondukas la rigardantojn en vivoplenan medion.

2152